


LA PAROĤESTRO DE ARS EN KRISTANAJ PREDIKOJ

Prologo pri la sankta Johano Vianney	1
Prediko pri la savo	13
Prediko pri la amo al Dio	14
Prediko pri la prioritato de la pura animo	15
Prediko pri la Sankta Spirito	17
Prediko pri la Plej Sankta Virgulino	19
Prediko pri festado de dimanĉo	21
Prediko pri la vorto de Dio	21
Prediko pri la preĝo	24
Prediko pri sacerdoto	25
Prediko pri la ofero de la sankta meso	27
Prediko pri la vera ĉeestado	28
Prediko pri la sankta komunio	30
Prediko pri ofta sankta komunio	31
Prediko pri la peko	33
Plua prediko pri la peko	35
Prediko pri la fiero	37
Prediko pri la malpureco	38
Prediko pri la pekkonfeso	39
Prediko pri la fundamentaj virtoj	41
Prediko pri la espero	43
Prediko pri la sufero	44



PROLOGO PRI LA SANKTA JOHANO VIANNEY

Ne ekzistas duboj pri tio, ke senkulpeco kaj pureco de la koro, kiuj estis ĉiam aŭ observitaj aŭ pere de la kredo kaj pieco denove akiritaj, donas al homo spiritajn, korpajn eĉ moralajn kapablojn, pri kiuj plej multaj homoj havas neniujn antaŭsentojn. Al tiuj kapabloj apartenas tio, kion la teologio nomas per nocio „scientia infusa“ – enverŝita scienco. Tion la Dia vorto sciigas al nia spirito, se ĝi en ni estas pere de la kredo kaj la amo.

Ĉe ekrigardo al la paroĥestro de Ars ni demandas: „Kiu iris pluen en malŝatado de la zorgoj de la mondo, en macerado de la korpo, en ofta ploro?“ Ni povas diri, ke li ploris preskaŭ senĉese. Tiuj, kiuj havis la feliĉon partopreni en Ars kristanajn predikojn kaj aŭdis ĉi tiun neforgeseblan vorton, kiu ne ŝajnis esti nura homa vorto, tiuj, kiuj estis atestantoj de la fascina influo, per kiu influadis la aŭskultantojn de ĉiuj sociaj tavoloj ĉi tiu profunda voĉo trapenetrita per sento kaj entuziasmo, neniam tion forgesis.

La parolo de la paroĥestro de Ars antaŭ ĉio ne baziĝas sur vortoj. La vera elokvento ne dependas de la enhavo de la parolo; kaj la enhavon de siaj paroloj li esprimadis per admirinda maniero. Lia animo tute trapenetris animojn de ĉiuj, kiuj senspire aŭskultis, tiel ke kune kun li ili kredis, amis kaj esperis. Kaj ĝuste ĉi tie estas tiu plej alta celo, sed same ankaŭ triumfo de la spirita prediko.

Kiel eblas, ke tiu ĉi viro, havanta modestajn konojn, kiu post sia sacerdotoĝo sin dediĉis nur al preĝado kaj konfesprenado, povas instrui kiel la eklezia patro? De kie fluis liaj scioj pri Dio kaj liaj mirindaj verkoj, pri la naturo; kiel eblas ekspliki, ke li instruis ĝuste tiel kiel plej gravaj personoj de la eklezio: la sanktaj Aŭgusteno, Bernardo, Tomaso la Akvinano, Katarino de Siena, Terezio?

La aŭskultantoj lin ekzemple aŭdis diradi, ke la koro de la sanktuloj estas gasa. Ili ja estis surprizitaj per tiu ĉi eksterordinara esprimo, sed ili ne konjektis, ke ĝi estas eĉ teologie ĝusta. Ja en la Sumo de la sankta Tomaso la Akvinano li elkalkulas kvar efikojn de la amo kaj ĝuste la unua el ili estas tio, ke ĝi aktivigas la koron esti gasa. La paroĥestro de Ars certe neniam legis verkon de la sankta Tomaso, kaj tial estas des pli okulfrape, ke li laŭvorte uzas esprimon de tiu ĉi grava teologo. Kompreneble super tio povus haltadi tiuj, kiuj ne konas realecon de la efikado de la graco kaj kiuj ne ekkomprenis vortojn de la Dia instruisto: „Kion vi kaŝis for de saĝuloj kaj prudentuloj, tion vi malkaŝis al infanoj.“ (Mat 11,25)

La Spirito enskribis en la koron de ĉi tiu sankta sacerdote ĉion, kion li devus scii kaj kion li devus instrui kaj Li engravuris tion tien des pli profunden kaj pli puran, ju pli malstreĉitaj kaj malplenaj estis la homaj koroj plenaj de vanteco. El la kredo fontis ĉiu scio de la paroĥestro de Ars. Lia lernolibro estis nia Sinjoro Jesuo Kristo. La saĝon li ne serĉis aliloke, nur en Jesuo Kristo, lia morto kaj en lia kruco. Alian saĝon li ne serĉis. Nek en polvo de bibliotekoj eĉ ne en instruoj de la scienculoj, sed surgenue, ĉe la piedoj de la Dia Majstro, antaŭ la tabernaklo, kie li pasigis tagojn noktojn. Tie li ellernis ĉion.

Tre miregis tiuj, kiuj lin aŭdis paroli pri la ĉielo, pri la dolora martirigo de Jesuo, pri lia vera ĉeestado en la Plej Sankta Sakramento kaj pri la Virgulino Maria, pri ŝiaj beleco kaj majesteco, pri la feliĉego de la sanktuloj, pri pureco de la anĝeloj, pri beleco de la animoj, pri la homa digneco. Ili tre ofte revenis el tiaj predikoj konvinkitaj, ke tiu ĉi bona sacerdote vidis per propraj okuloj tion, pri kio li per tia kora ardo kaj elokvento entuziasme parolis. Lia parolo akiradis tian konvinkecon kaj ravantan kredindecon, ke ni apenaŭ por tio trovus komparon. En lia voĉo, en liaj movoj, en la rigardo, en lia metamorfozita staturo brulis ĉiela fajro kaj la miranta forto, ke tio ne lasis homon malvarma. La rigardoj kaj la ideoj, kiujn al homo pruntedonas Dia lumo, havas tute alian efikon ol tiuj, kiujn ni akiras per klopoda studado. Danke al simpleco, klareco kaj la forta konvinko, kun kiuj li parolis, disiĝadis duboj eĉ en la koroj de la plej grandaj kontraŭuloj kaj sur ĝian lokon eniĝadis admirinda lumo de la kredo.

La vortoj de la paroĥestro de Ars efikadis des pli potence kaj pli certe ĝuste tial, ke li predikadis per la tuta sia esteco. Jam nura lia ĉeesto estis revelacio de la vero. Pri li oni povis prave diri, ke li parolis per okuloj kaj ke li la aŭskultantojn kapablis emociigi kaj konvinki, sen diri nur unu vorton. Kiam oni vidis sur predikejo tiun palan, ostohavan kaj diafanan vizaĝon kaj aŭdis klaran, penetreman voĉon similtantan la krion, kiel li rakontas al la aŭskultantoj majestajn ideojn, tiam oni povus opinii, ke oni aŭdas iun el la grandaj bibliaj personoj, kiuj parolis al popolo per la parolo

de profetoj. Kaj homo estis tuj traigita per estimo, plenigita per konfido kaj interne tiel kortuŝita, ke li atenteme aŭskultis ne tiel pro scivolemo, sed pli prefere por havi el tio utilon.

Pli frue ol li komencis, la predikanto superrigardis ĉiujn aŭskultantojn, per kio li trapuŝis vojon al sia vorto. Iafoje li ekrigardis atenteme kaj tiumomente ŝajnis, ke lia rigardo trapenetras ĝis fundo de la animo, el kiu li kvazaŭ legus tekston por sia meditado. Kiom da estis tiuj, kiuj opiniis, ke li parolas pri ili kaj por ili. Tiuj, kiuj lin aŭskultis, ofte sin ekkonis, se li parolis pri iliaj sekretaj malfortaĵoj.

Tiuj, kiuj partoprenis tiujn ĉi kristanajn predikojn, kaptis atenton per du admirindaj faktoj: per la predikanto kaj la aŭskultantoj. Ne estis tio do nur lia vorto, kiu estis aŭdita. Ĉi tie sin donadis lia sankta animo tute trapenetrata per kredo kaj amo kaj koncerne la aŭskultantojn, tiumomente ili ne plu estis surtere, sed estis transportitaj en la purajn regionojn, de kie veroj kaj misteroj de la kredo elfontas. Kiam la sanktulo parolis, malfermiĝis la menso de la aŭskultantoj al novaj kaj klaraj elrigardoj: la ĉielo kaj la tero, la estanta kaj la estonta vivo, la aferoj surteraj kaj eternaj sin montris en la nova lumo tiel, kiel tion ĝis nun homo eĉ ne konjektis.

Kiam ajn venis iu el kutima hasto de la mondo influita per la mondecaj imagoj kaj aŭskultis lian instruon, li sin sentis kvazaŭ senkonsciigita, venkita ĝisteren. La mondo do estis al li bildigita en tiaj koloroj, ke li ekkomprenis la tutan ĝian neniecon. Unue li eksentis iun vertiĝon kaj ridigecon plenan de mirego, kiun li antaŭe ne konis, sed pli poste lin ekposedis forta kortuŝiĝo kaŭzanta ploron kiel ĉe la ceteraj. Kiu granda predikanto aŭ oratoro kapablis iam plorigi la aŭskultantojn? La parolo de Vianney trafadis kaj mastris la tutan animon kaj alkondukadis reen al Dio, kaj ne per la vojo de longaj kaj malfacilaj konvinkadoj, sed per la vojeto de la interna kortuŝo sen ĉirkaŭvojo rekte al la celo.

Ĉiuj aŭskultadis Vianney kiel novan apostolon, kiun Jesuo sendis al sia eklezio, por en ĝi renovigi sanktecon kaj fajron de la Sankta Spirito, en la tempo, kiu per sia malboniĝo senlumigis multajn homajn animojn. Kaj estis tute neordinare, ke li parolis kontraŭ gusto de la tempo kaj la mondo – li nome parolis nur pri la kruco, humileco, malriĉeco, pri la pento – ĝuste tiu ĉi lia instruo ricevis tiel grandegan akcepton. Tiuj, kiuj ankoraŭ ne kuraĝis laŭ liaj vortoj ordigi sian vivon, almenaŭ konfesadis, ke li estas admirinda, kaj ili agnoskis, kiel estas liaj konsiloj vere utilaj.

Ne pli malmulte admirendas estas, ke eĉ se li parolis per sia ordinara parolmaniero, tio estas per la neprecioza parolo de la kamparanoj, tamen lin komprenis ĉiuj kaj lia voĉo sonis tra la tuta tero. Venadis al li multaj por bone ekkoni Jesuon Kriston. Ne nur homoj simplaj, sed ankaŭ doktaj, ne nur perfektaj, sed ankaŭ indiferentuloj trovadis ĉe li iun Dian ĝuegon, kiu trapenetradis ilin kaj denove ilin altiradis. Ju pli ofte iu lin aŭdis, des pli ofte li volis lin denove aŭskulti kaj ĉiam li revenis kun amo al sia predikejo kiel al la loko, kie li trovas belecon kaj veron. Kaj ĝuste tio pruvadis pli ol ĉio cetera, ke la paroĥestro Vianney estis plena de la spirito de Dio, kiu ununura estas pli granda ol nia koro.

La sankta paroĥestro parolis senprezare – la preparon li ne bezonis, ĉar li es-

tis konstante per sia spirito kaj koro kunigita kun Dio. Li rekte el konfesejo suriris predikejon, kaj tamen li tien enportadis nesuperantan konfidon, admirindan kuraĝon, kiuj ne estis konsekvenco de lia persona certeco, sed pli prefere de lia totala kaj senkondiĉa sindediĉo. Menciindas, ke neniu estis tentata lin kritiki. Homoj ofte prijuĝas tiujn, por kiuj ne estas indiferente, ke iu ilin kritikis. Ĉiu tiumomente okupiĝis per io alia ol prijuĝi la paroĥestron. Kiam iu aŭdis liajn vortojn, li prijuĝis nur sin mem.

Vianney neniam zorgis pri tio, kion oni pri li parolas aŭ pensas. Eĉ se la homamaso de liaj aŭskultantoj estis kiel ajn granda kaj ofte en ĝi estis ankaŭ episkopoj, kiuj atendis antaŭ lia predikejo, neniam malsekretigis iu lia vorto mensemociiĝon eĉ ne iujn hezitojn, kiuj eliĝadus pro la homa timo. Li, kiu estis tiel malkuraĝa kaj modesta, kiam ajn li iris tra densaj vicoj de ofte grandioza kolektiĝo, estis kvazaŭ alia homo: li havis aspekton de venkinto, rektigitan kapon, liaj okuloj brilis. Foje lin iu demandis: „Ĉu ne efikis je vi deprime tiu multnombra aŭskultantaro?“ „Ne,“ li respondis „ĝuste male. Ju pli multe da aŭskultantoj estas ĉi tie, des pli mi sentas kontenton.“ Kun rideto li poste aldonis: „Fieruloj ĉiam opinias, ke ili agas ĝuste. Se mi vidus papon aŭ kardinalojn aŭ reĝon sub la predikejo, neniam mi parolus eĉ unu vorton pli, nek unu vorton malpli.“ Li do ĉiam pensis nur pri la animoj kaj la pensojn de siaj aŭskultantoj li turnadis al Dio. Tiu ĉi lia grandega memregado kompensis talenton kaj oratoran arton. Tial ankaŭ ĉio, kio eliris el lia buŝo, estis trablovita per specifa majesto kaj fascina forto.

La parolo de Vianney tial efikadis tiel forte, ke la pilgrimuloj estis konvinkitaj pri lia sankteco. Sankta Izidoro diras: „La unua propreco de la viro, kiu estas vokita al malfacila tasko instrui popolon, estas lia sankta kaj senriproĉa vivo. Kiu havas devon la aliulojn malproksimigi de la peko, tiu mem devas esti la plej granda malamiko de la peko. Al kiu lia misio ordonas gvidi aliajn al perfekteco, tiu mem devas en ĉio montriĝi kiel modelo de la perfekteco.“ Ĉe la sankta predikanto de Ars predikis veron lia virta vivo. Se li heroldis amon al Dio, humilecon, kvietecon, paciencon, maceradon, oferecon, malriĉecon, ĝojon dum sufero, lia ekzemplo donadis al liaj vortoj grandan signifon. La instruisto de la virtoj facile konvinkas kaj akiras korojn, kiam videbliĝas, ke li mem faras tion, kion li instruas. La maniero, kiun uzadis la paroĥestro de Ars, estis nenio alia ol la plej klara pakkovraĵo, kiun sur sin povas preni ideo por sin elmontri tia, kia ĝi estas. Li kapablis eĉ tiujn plej altajn verojn klare prezenti al ĉiu. Li kortuŝis per simpleco kaj la entuziasmon de la aŭskultantoj li vekadis per enhavo de la prelego.

Tiu ĉi viro, kiu rekonadis sian nesciadon, tre estimis pli altajn mensajn kapablojn. La plej alta laŭdo, kiun li kapablis pri iu diri, estis, ke li havas spiriton. Se iu antaŭ li elkalkuladis ecojn de iu eminenta persono, malofte li forgesis kompletigi la laŭdparolon per la vortoj: „Precipe mi estas ĝojigita, ke li estas dokta.“

Vianney ŝatis donacon de elokvento de aliuloj kaj li ĝojis pro ili. Li laŭdis Dion pro tio, ke Li donis pro sia gloro al homo tiel belajn gracojn. Malmulte interesis lin gramatikaj eraroj, tion ne permesadis al li lia humilo. Malgraŭ tio, ke lia parolo havis

erarojn, ĝi trafadis animojn, iluminis kaj konvertis ilin. Sankta Hieronimo diras: „La parolo bone aranĝita sonas nur agrable en la oreloj. Tiu, kiu sen ornamaĵoj parolas veron, ĉar li estas per ĝi trapenetrita, tiu malfermas por si la vojon al koroj.“

La vorto de la paroĥestro de Ars estis kiel elpafita sago. En liaj vortoj kuniĝadis pasio, profundo kaj majesto kun simpleco kaj ordinareco. Estis eble trovi diversspecan malzorgon kaj neprecizecon, sed ankaŭ belon kaj povon de la parolo prezentita senprebare. Iam la aŭskultantoj provis noti, kion ili aŭdis. Sed ili ne kapablis pervorte kapti tion, kio ilin plej multe okupis, kaj doni al tio formon. Ridigiĝis tio sur pinto de la skribilo. Estis ĝi malvarmigita lafo. Kelkajn vortojn ili tamen kolektis kaj ankaŭ ni en ili trovas pli multe ol nuran rememoron, resonon. Ni en ili trovas la paroĥestron de Ars mem. Estis nenio eksterordinara aŭdi de li similajn majestajn kaj profundajn pensaĵojn kiel estas ĉi tiu: Ami Dion! Ah, kiel tio estas bela. Nur la ĉielo kapablas ekkompreni amon. La ĉielo estas por tio rimedo, ĉar la preĝo estas leviĝo de la menso al la ĉielo. Ju pli bone ni konas homojn, des pli malmulte ni ilin amas. Kaj ĉe Dio estas tio ĝuste male. Ju pli multe ni Lin konas, des pli multe ni Lin amas. Tiu ĉi ekkono vivigas animon per tiel granda amo, ke la animo povas jam tion ununuran: nur ami Dion, nur sopiri pri Li. Homo estis kreita pro amo. Tial li estas tiel forte instigata ami. Li do estas tiel granda, ke nenio lin surtere kapablas plenigi. Nur se homo sin turnas al Dio, li estas kontentigita. Eltiru fiŝon el akvo, ĝi sufokmortos. Ĝuste tiel estas por homo sen Dio. Ekzistas homoj, kiuj ne amas bonan Dion, kiuj ne preĝas al Li, kaj tamen ili bonfartas. Tio estas malbona signo. Apud multe da malbono ili faris eĉ ion bonan. La bona Dio ilin rekompencas dum tiu ĉi vivo.

La tero estas ponto por transiro trans akvon. Ĝi estas nur apogbazo por niaj piedoj. Ni estas en ĉi tiu mondo, sed ni ne estas el ĉi tiu mondo, ja ĉiutage ni diradas Patro nia, kiu estas en la ĉielo. Ni do devas atendi nian salajron, ĝis ni estos en nia patrujo, en la patra domo. Ĝuste tial bonaj kristanoj vivas kun kruco, en suferoj kaj malfacilaĵoj, ili estas malŝatataj, kalumniataj – des pli bone! Sed ŝajnas tio al ni tiel stranga. Kompreneble. Ĉar iom ni amas bonan Dion, aplombe, ke ni devus esti ŝirmitaj de ĉiuj malfacilaĵoj kaj turmentoj. Ni diras: „Estas ĉi tie homo, kiu ne estas singardema, kaj tamen li bone prosperas. Dume al mi ĉio malboniĝas, kion mi tuŝas.“ Tio estas pruvo, ke ni ne distingas valoron kaj feliĉon de la kruco. Ofte oni diras: „Dio punas tiujn, kiujn Li amas.“ Tio ne estas vera. La provoj de tiuj, kiujn Dio amas, ne estas punoj, sed gracoj.

Ni ne devas pensi pri laboro, sed pri salajro. Komercesto ne rigardas malfacilaĵojn de sia komercado, sed profiton, kiun li per tio akiros. Kio estas dudek tridek jaroj kompare al eterneco? Kion ni devas toleri tiel malfacilan? Ian humiligon, malvarman rifuzon, malicajn vortojn: tio ne senigos nian vivon. Estas bele, ke ni povas ekplaĉi al Dio, malgraŭ tio, ke ni estas kiel ajn malgrandaj.

Ni devas eluzadi nian langon nur por preĝo, nian koron nur por ami, niajn okulojn nur por ploro. Ni estas multo kaj nenio. Nenio estas pli granda ol homo kaj nenio estas pli malgranda ol homo. Nenio estas pli granda, se ni observas nian animon, nenio pli malgranda, se ni observas nian korpon. Ni okupiĝas per nia korpo,

kvazaŭ ni devus zorgi nur pri ĝi: Male ni devas ĝin malŝati. Ni estas verko de Dio. Ĉiu ĉiam amas sian verkon. Ekkompreni, ke ni estas verko de Dio, estas facile; sed ke la krucumo de Dio estas nia verko, tio estas io nekomprenebla.

Iuj homoj atribuas al la eterna Patro malmolan koron: Ah, kiel ili tre eraras. La eterna Patro donis al sia Filo ege bonan koron, por ke Li senarmigu sian propran justecon: neniu donadas tion, kion li mem ne havas. Nia Sinjoro diris al sia Patro: „Patro mia, ne punu ilin!“

Nia Sinjoro suferis pli, ol estis necese por nia savo. Sed kio kontentigus la justecon de lia Patro, tio ne kontentigus lian amon. Sen morto de nia Sinjoro ĉiuj homoj entute povus pacigi eĉ ne unu malgrandan mensogon.

En la mondo estas kaŝitaj ĉielo eĉ infero: La ĉielo, ĉar se ni konus ĝian belecon, ni volus ĉiurimede eniri ĝin; certe ni trankvile forlasus la mondon. La infero, ĉar se ni konus ĝiajn turmentojn, ni farus kion ajn por ne eniri ĝin.

La krucosigno estas por diablo terura, ĉar ni eskapas al li ĝuste pere de la kruco. La krucosignon ni devas fari kun granda estimo. Ni komencas surfrunte: tio estas kapo, kreo, Patro; poste sekvas koro: amo, vivo, savo, Filo; plue ŝultroj: forto, la Sankta Spirito. Ĉio nin kondukas al kruco. Ni mem estas kreitaj por simileco de kruco.

En la ĉielo ĉiu vivtenos sin per spiro de Dio. Bona Patro starigos ĉiun el ni sur lokon, kiu al li apartenas, tiel kiel konstruisto destinas al ĉiu ŝtono ĝian lokon en konstruaĵo.

La ĉielo sin enverŝadis en animojn de la sanktuloj. Estis tio fluo de ĉielo, en kiu ili banadis kaj dronadis. Kiel disĉiploj sur monto Tabor vidis nenion ol nuran Jesuon, tiel vidas piaj animoj sur Tabor nur la Sinjoron. Tio estas du amikoj, kiuj sin reciproke neniam satiĝos.

Multaj perdis kredon kaj vidas inferon nur tiam, kiam ili jam en ĝin eniras. La damnitaj estas ĉirkaŭitaj per Dia kolero kiel fiŝo per akvo. Ne kondamnas nin Dio, sed ni mem per niaj pekoj. La damnitaj ne plendas pri Dio, sed ili plendas pri si mem. Ili diras: „Ni perdis Dion, nian animon eĉ ĉielon proprakulpe.“

Neniam estis iu damnita tial, ke li faris multan malbonon; sed multaj estas en infero pro unu mortpeko, kiun oni ne volis pribedaŭri. Se la damnito nur unufoje povus diri: „Mia Dio, mi amas vin!“ ne plu estus por li infero. Ah, kompatinda animo! Ĝi perdis kapablon ami, la kapablon, kiun ĝi ricevis kaj kiun ĝi ne kapablis eluzi. Koro de la damnito estas elsekigita kiel dispremita vinberaro. En tiu ĉi animo ne plu estas spuro pri beateco, neniu paco. Tio tial, ĉar en ĝi mankas amo!

Infero havas sian fonton en Dia boneco. La damnitaj dirados: „Ah, se nin Dio nur ne tiom amus, ni pli malmulte suferus. La infero estus pli tolerebla!“ Sed ĉar ili estis tiel multe amataj, kia estas doloro.

Kun profundaj pensaĵoj kunigadis Vianney eĉ pensaĵojn fortajn kaj splendantajn. Li nomis tombejon kiel komunuman domon; la purgatorion kiel hospitalon de bona Dio; la teron kiel deponejon de la varoj. Li diris: „Ni estas surtere nur tre mallongan momenton kiel en la deponejo. Ŝajnas al ni, ke ni restas senmovaj, kaj

tamen ni paŝas per grandaj paŝoj renkonten al la eterneco kiel vaporo.“

Li demandis mortanton: „Kion ni skribu sur vian tombon?“ „Donu tien: Ĉi tie kuŝas kompatinda homo, kiu foriris el ĉi tiu mondo sen scii, kiel li sur ĝin venis.“ Multaj foriras el ĉi tiu mondo nesciante, kion ili devus ĉi tie fari, kaj ili eĉ pri tio ne interesiĝas. Ni ne estu similaj al ili! Se la kompatindaj damnitaj havus tempon, kiun ni perdas, kiel bone ili eluzus ĝin! Se nur duonhoron, tiu ĉi duonhoro la inferon senhomigus.

Kiam ni mortas, ni donas kompensaĵon: ni redonas al tero, kion ĝi al ni donis. Iom da pinĉaĵoj da polvo grandaj kiel nukso, tio ni estos. Sed pri tio ni povas fieri! Por nia korpo estas la morto nura lesivo. Sur ĉi tiu mondo ni devas labori, ni devas batali. Foje dum la tuta eterneco ni povos ripozi. Se ni bone ekkomprenus nian sorton, ni povus diri, ke ni estas pli feliĉaj ol sanktuloj en la ĉielo. Ili vivas koste de siaj interezoj; nenion pli ili povas akiri, sed ni povas nian trezoron ĉiumomente pliigi.

La Diaj ordonoj estas kiel instrukcioj, kiujn al ni donas Dio survoje al ĉielo; ili similas al strataj afiŝetoj. La graco de Dio al ni helpas iradi subtenante nin. Tiom multe ni ĝin bezonas, kiel bezonataj estas lambastonoj por tiuj, kiuj havas malfortajn kruojn.

Kiam ajn ni volas pekkonfesi, ni devas bone pripensi, kion ni volas fari. Ni povas diri, ke per tio ni intencas al nia Sinjoro eltiri najleĝojn el manoj kaj piedoj. Se vi faris bonan pekkonfesion, vi ligis diablon per ĉeno. La pekoj, kiujn ni prisilentas, ĉiuj elmontriĝos. Kiu volas bone kaŝi siajn pekojn, tiu devas sincere ilin pekkonfesi. Niaj pekoj estas sablero kompare al granda monto de la Dia kompatemo.

La paroĥestro de Ars uzadis en sia instruado multajn parabolojn kaj bildojn. Li ilin ĉerpis el naturo, kiu al aŭskultantoj estis bone konata, el priskribo de regiono, el la kamparana vivo. Li konservis plenfreŝe rememorojn el sia junaĝo kaj eĉ kiel maljunulo dum siaj predikoj en li vekigis sentoj, kiujn li tiumomente konvene eluzis. En tiuj ĉi mensaj revenadoj al la plej belaj tagoj de la vivo certamaniere sin esprimas certeco de la resurekto. Nia Sinjoro Jesuo uzadis la plej konatajn eventojn, la plej ordinarajn okazaĵojn, la okazintaĵojn, kiuj okazadis antaŭ liaj okuloj por bildigi spiritan vivon eluzante ilin por siaj instruadoj. La evangelio plenas je bildoj kaj priskriboj, kiuj kapablas konduki animon tra komparado al ekkompreno de la eternaj veroj.

Simile tion faris ankaŭ la paroĥestro de Ars. Lia spirito al kutimiĝis edifiĝi de la aferoj videblaj al Dio kaj al la aferoj nevideblaj. En ĉiu lia kristana ekzerco estis ripetita parolo pri rojoj, arbaroj, arboj, birdoj, floroj, roso, lilioj, balzamo, agrablaj aromoj kaj pri mielo. Ĉiuj, kiuj praktikadis mediteman vivon, amis tiun ĉi parolon kaj la senkulpeco de iliaj pensoj alteniĝis kun plaĉo al ĉiuj ĉi tiuj ĉarmaj kaj puraj instigoj, per kiuj la kreinto ornamis sian verkon. La Sinjoro Jesuo diras: „Bona mastro elportas bonajn aĵojn el sia bona trezoro.“ Bonvolemaj verkoj de la sankta Francisko de Sales estas por ĉiuj viroj valora modelo por tiu ĉi vojiro. Ni ne miru, kiam ni ĉe ĝeneva episkopo trovas tian parolĉarmon kaj tiel delikatan kaj adekvatan belguston. Sed kie nia kamparana paroĥestro ellernis ligi tiel pompajn florbuke-

dojn? Kiu lin iniciis en tiujn ĉarmojn, kiu lin kapabligis, por ke li eluzadu ilin kun tia gusto kaj spriteco? Ni aŭskultu: Kiel belega blanka kolombino, kiu eliras el akvo kaj sur firma tero ĝi deskuas flugilojn, alvenas la Sankta Spirito el senfina oceano de la Diaj perfektecoj aspergante per flugiloj purajn animojn por ilin refreŝigi per balzamo de la amo.

La Sankta Spirito ripozas en pura animo kiel sur lito el rozoj. El la animo, en kiu estas la Sankta Spirito, eliĝadas ĉarma aromo kiel el vinberujo, kiam ĝi floras. Tiu, kiu konservis la baptan senkulpecon, estas kiel infano, kiu neniam malobeis sian patron. Tiu, kiu konservis sian senkulpecon, sentas sin portata per la amo supren kiel birdo sin portas per flugiloj. Tiuj, kies animo estas pura, estas kiel agloj kaj hirundoj, kiuj flugetas en la aero. La animo nehavanta purecon, estas surtere kiel birdo alligita per fadeno. Bedaŭrinda birdeto! Ĝi nur atendas momenton, kiam la fadeno malligiĝos, por ke ĝi povu de tie forflugi. Bonaj kristanoj estas kvazaŭ birdoj havantaj grandajn flugilojn kaj malgrandajn ungojn kaj kiuj neniam eksidas sur la teron, ĉar ili ne plu povus leviĝi kaj estus kaptitaj. Tial ili konstruas siajn nestojn sur rokaltajoj, sur domtegmentoj, sur altaj lokoj. Ĝuste tiel devas kristano ĉiam vivi en altaĵoj. Se ni klinigos niajn pensojn al la tero, ni estas kaptitaj.

La pura animo estas kiel bela perlo. Se ĝi estas kaŝita sur la marfundo en iu konkajo, neniu ekmemoras ĝin admiri. Sed se ĝi estas eksponita al suno, tiam ĉi tiu perlo brilas kaj la okuloj de ĉiuj turniĝas al ĝi. Ĝuste tiel foje la pura animo, kiu estas nun kaŝita antaŭ vido de la mondo, brilos antaŭ anĝeloj sur suno de la justeco. La pura animo estas belega rozo; kaj el la ĉielo venas enspiri ĝian agrablan odoron tri Diaj personoj. La Dia mizerikordo estas kiel elbordigita rivero: ĝi altiras al si koron.

Kara Dio pardonas al pentanta pekulo pli rapide ol patrino eltiras infanon el flamoj. Imagu kompatindan patrinon, kiu devas lanci gilotonon sur kapon de sia infano: en tia situacio estas bona Dio, se Li damnas iun pekulon.

Kia ĝuego estos por justuloj, kiam je la fino de la mondo iliaj animoj trapenetrataj per aromo de la ĉielo serĉos sian korpon, por kun ĝi dum la tuta eterneco ĝuegi Dion! Tiam eliros niaj korpoj el tero kiel tolo purigita pere de lesivo. La korpoj de la justuloj brilos surĉiele kiel belegaj diamantoj. Kiel ĝoja ekkrio okazos, kiam kuniĝos la animo kun sia glorigita korpo, kiu por ĝi ne plu estos pekilo eĉ ne kaŭzo de sufero! Ĝi banos sin en balzamo de la amo kiel abelo ĝuanta florojn.

Estas senteble, ke la paroĥestro de Ars estis poeto, sen tion mem konsciiĝante, la poeto en la plej alta kaj la plej vera vortsenco, li estis per eminenta maniero pridonacita per kapablo sensi. Lia koro malfermiĝadis, por ke el ĝi eliru ĝusta melodio kaj ĝusta tono.

„Foje printempe,“ li diris, „mi vizitis malsanulon. La arbedaĵoj estis plenaj de birdoj, iliaj gorĝoj preskaŭ ke ne krevis pro kantado. Mi ilin kun ĝuo aŭskultis kaj en spirito mi diris al mi: „Bedaŭrindaj birdetoj, vi ne scias, kion vi diras! Kia domaĝo! Vi kantas laŭdante Dion!“ Ĉu ne memorigas tio al ni, kvazaŭ ni aŭdus la sanktan Franciskon el Asizo?

Unu el liaj pripensemaj aŭskultantoj skribis: Nia sankta paroĥestro estas ĉiam same admirinda; en sia vivo, en siaj agoj eĉ vortoj. Eble tio mirigos vin, sed estas nenio pli vera. Estas io tute neordinara, se granda homamaso kun ĝuego kunpuŝas sin por aŭskulti liajn kristanajn predikojn. Spektro de lia aŭskultantaro estas tre varia. Mi aŭdis eminentajn sacerdotojn, laikojn, scienculojn eĉ fakulojn aserti, ke nenio ilin tiel tre kortuŝis ol tiu ĉi grandanimeco de la koro, kiu meditas, amas, ĝemas kaj adoras. Povus esti farita kolektaĵo el retoraj floroj de la paroĥestro de Ars. Kiam li parolas pri la homa animo, ni sentas ĝustan ĉarmon kaj vivecon de la rakontado.

Ĉu eble fiŝo elserĉadas arbojn aŭ herbejon? Ne, ĝi moviĝas gaje en la akvo. Ĉu restadas birdo sur la tero? Ne, ĝi flugpendas en la aero. Kaj kion homo, kiu estas kreita, por ami Dion, Dion akiri, Dion en si havi? Kion faros homo kun ĉiuj ĉi tiuj fortoj, kiuj estas al li tiucele pruntedonitaj?

Vianney volonte rakontadis poezian kaj beletan legendon pri la sankta Maŭricio, kiu trovis grandan serponton, kiam li foje portis tagmanĝon al la sankta Benedikto. Li ĝin prenis metinte ĝin en la poŝon de sia mantelo kaj montris ĝin al la sankta Benedikto: „Rigardu patro, kion mi trovis!“ Kiam kolektiĝis ĉiuj monaĥoj, la serpento komencis sibli volante ilin mordi. Tiam la sankta Benedikto diris: „Knabo, forportu ĝin tien, de kie vi ĝin prenis.“ Kaj kiam la sankta Maŭricio foriris kun serpento, li eksplikis: „Ĉu vi eble scias, karaj fratoj, kial tiu ĉi besto estas tiel malsovaĝa estante ĉe tiu knabo? Ĉar li konservis la bapton senkulpecon.“

Ankaŭ li volonte rakontadis okazintaĵon pri la sankta Francisko el Asizo, kiu predikis al fiŝoj, kaj tiu ĉi rava flanko de la poezia okazintaĵo nur ankoraŭ akiris, kiam ĝi estis rakontata fare Vianney. Foje li diris: „La sankta Francisko predikis en regiono, kie estis multaj herezuloj. Tiuj ĉi nekredantoj ŝtopadis siajn orelojn por lin ne aŭskulti. La sanktulo, kiu alkondukis homojn al la marbordo, alvokis fiŝojn por aŭskulti vorton de Dio, ĉar homoj ĝin aŭdi ne volis. La fiŝoj alnaĝis al la marbordo, la grandaj malantaŭ la malgrandajn. La sankta Francisko ilin demandis: ‚Ĉu vi estas dankemaj pro tio, ke vin la bona Dio savis antaŭ diluvo?‘ La fiŝoj jesis. Tiam diris la sankta Francisko al homoj: ‚Rigardu, tiuj ĉi fiŝoj estas dankemaj pro bonkoreco de Dio kaj vi, maldankemuloj, vi Lin malestimas.‘“

La paroĥestro Vianney almiksadis en siajn parolojn feliĉajn rememorojn el sia animpaŝtista vivo: Ni devus tion fari kiel paŝtistoj, kiuj dum malvarmo estas surkampe – la vivo estas longa vintro! – ili faras fajron. Ĉiumomente ili kolektas lignon alportante ĝin de ĉie ajn por daŭrigi la fajron. Se ni kapablus kiel tiuj ĉi paŝtistoj daŭrigi ĉiam per preĝoj kaj per perfektaj agoj en nian koron enigi amon al Dio, tiam la fajro de la amo ne estingiĝus. Se vi ne havas amon al Dio, vi estas komatindaj. Vi estas kiel arbo sen floroj kaj fruktoj. En la animo kunigita kun Dio estas senĉesa printempo.

Parolante pri la preĝo, venadis sur liajn lipojn la plej ĉarmaj vortoj kaj la plej bona komparo. La preĝo estas dolĉe odoranta roso, sed ni devas preĝi kun pura koro por tiun ĉi roson senti. El la preĝo eliĝas agrabla dolĉeco kiel suko fluanta el

plenmatura vinberaro. La preĝo forigas el nia animo materiojn, ĝi levas ĝin supren kiel fajro, kiu blovŝveligas balonojn. Ju pli multe ni preĝas, des pli ni volas preĝi. Ni estas kiel fiŝoj, kiuj unue naĝas surface de la akvo, poste ili mergiĝas ĉiam pli profunden. La animo mergiĝas kaj perdiĝas en ĝojoj de la kuneco kun Dio.

En la preĝo estas nenia tempodaŭro. Mi ne scias, ĉu iu ne povas sopiri pri la ĉielo. Ah, jes. La fiŝo naĝanta en rojeto sin sentas feliĉa, ĉar ĝi troviĝas en sia elemento. Ankoraŭ pli bone ĝi sentus sin en la maro. La bona Dio ne bezonas nin. Kiam Li kondukas nin al tio, ke ni preĝu, tion Li faras nur tial, ke Li volas nian savon kaj ke tiun ĉi nian savon ni povas trovi nur en Li. Se Li vidas nin alvenadi, Li klinigas sian koron al sia kreitulo kiel patro, kiu sin klinas por aŭskulti amatan infanon, kiu kun li parolas.

Matene ni tion devas fari tiel, kiel infano kuŝanta en lulilo. Kiam ĝi malfermas siajn okulojn, tuj ĝi ĉirkaŭrigardas, ĉu ĝi ekvidos patrinon. Kiam ĝi ekvidas ŝin, ĝi komencas rideti. Se ĝi ne ekvidas ŝin, ĝi esploras.

Kiam Vianney parolas pri sacerdoto, li uzas belan kaj kortuŝan ekzemplon: La sacerdoto estas por vi kiel patrino, kiel mamnutristino de la infano, kiu havas nur kelkajn monatojn. Ŝi donas al ĝi manĝon, al infano sufiĉas nur malfermi buŝeton. La patrino diras al sia infano: „Jen, etulo, manĝu.“ La sacerdoto sin turnas al vi: „Prenu kaj manĝu, tio estas la Korpo de Jesuo Kristo. Li vin protektu kaj alkonduku al la eterna vivo!“ Ah, jen belegaj vortoj. Kiam infano ekvidas sian patrinon, ĝi rapidas al ŝi. Ĝi baŭmas al tiuj, kiuj ĝin retenas. Ĝi malfermas sian malgrandan buŝon kaj etendas siajn braketojn por ŝin ĉirkaŭbraki. Ankaŭ via animo sin kliniĝas en ĉeesto de la sacerdoto antaŭ Dio; ĝi rapidas renkonten al Li, sed ĝi estas per ligilo de la korpo tenata ĉe homoj, kiuj faras ĉion eblan por siaj sensoj kaj vivas nur por sia mortema korpo. Nia animo estas kuŝigita en nia korpo kiel infano en vindotukoj. Ni vidas nur ĝiajn siluetojn. Al ĉiuj eble estas akceptebla vereco, ĝusteco kaj kortuŝo de tiuj ĉi ekzemploj.

Foje venis al ni rabia lupo volanta ĉion devori. Ĝi trovis survoje dujaran infanon, ĝi prenis ĝin per dentoj volante ĝin forporti. Sed viroj laborantaj en vinberejo ekiris kaj elŝiris ĝian predon. Ĝuste tiel nin elŝiras la pentosakramento el ungegoj de diablo.

La bona kristano ne zorgas pri mondhavaĵo, li forkuras antaŭ ĝi kiel rato, kiu eliras el akvo. Bedaŭrinde nia koro ne estas sufiĉe libera kaj pura de ĉiuj surteraj inklinoj. Sed ni prenu puran kaj sekan spongon. Trempu ĝin en iun fluidaĵon kaj ĝi ensorbiĝos, ĝis ĝi superfluas. Sed se ĝi ne estas pura kaj seka, nenion ĝi en si entenos. Ĝuste tiel same, se iu mergas sian koron en la preĝon, nenio sin en ĝi tenos, se lia koro ne estas libera kaj senigita de la surteraj aferoj. Koroj de malbonuloj estas formikejo de pekoj. Ĝi similas al peco da putrita viando, pri kiu interbatalas vermoj. Se ni fordonas nin al niaj pasioj, tiam nian koron ni ĉirkaŭplektas per dornoj.

Diablo nin amuzas ĝis la lasta momento tiel, kiel oni amuzas mizerulon ĝis la momento, ol lin arestos gardistoj. Kiam ili venas, la mizerulo krias kaj teruriĝas, sed pro tio ili ja lin ne liberigos.

Kiam homo mortas, ofte li estas kvazaŭ peco da rusta fero, kiu devas esti ĵetita en la fajron. Mizeraj pekuloj estas rigidaj kiel serpentoj dumvintre.

Tiu, kiu kalumnias, similas al raŭpo, kiu rampas sur floroj, postrestas sur ili sian mukon, kaj tiel ĝi ilin malpurigas.

Kion vi dirus pri homo, kiu kultivus najbaran kampon, sed sian li lasus sen kultivado? Do konsciiĝu, ke vi tion tiel faras. Vi ŝpatas kaj pikparolas senĉese en konscienco de aliuloj kaj sian vi lasas nekultivitan. Ah, kiam venos morto, kiel ni bedaŭros, ke ni tiel tro interesiĝis pri aliuloj kaj tiel malmulte pri ni mem. Ĉar por ni kaj ne por aliaj ĉiu el ni prezentos kalkulojn. Ni nur pensu pri ni, pri nia konscienco, kiun ni devus esplori ĉiam tiel, kiel ni rigardas manojn por vidi, ĉu ili estas puraj.

Ni havas ĉiam du sekretariojn. Diablon, kiu notas niajn agojn por plendi pri ni, kaj nian bonan anĝelon, kiu notas bonagojn, ah, kiel malmulte da ili plaĉos al Dio, kaj do ankaŭ el tiuj plej bonaj! Tiom da malperfektaĵoj, egoismaj pensoj, homaj konsideroj, voluptemaj ŝatoj kaj de memamo en ili almiksita. Ili ekstere aspektas bele, sed tio estas nur kiel frukto, kiu deekstere aspektas pli flava kaj pli matura, ĉar interne ĝi estas atakita per vermo.

El tiuj ĉi fragmentetoj ni vidas, ke Vianney apartenis al meditemaj personoj, kiuj ne timis plibeligi striktecon de siaj ideoj per simpleco de esprimo. Tio fontis kiel el mizerikorda kliniĝo al sia lernanto, tiel ankaŭ el ia natura inklino, kiun sentas ĉiuj, kiuj estas okupitaj per beleco. Ne estas tio tiel ordinara kaj facila – ami naturon. Estas por tio bezonate, ke homo eliru el si mem, observu la eksteran mondon sen ĉiuj ajn profitemaj motivoj, kun estimo kaj ne serĉante en tio distriĝon, sed instruon.

La kristanismo kiel unusola instruas homon vere ŝati la naturon kaj ĝin ami pro tio, ke li malkovras Dian planon, kiu formas ĝian fundamenton, kiu pere de la naturo tralumetas kaj travidebligas ĝin. En tiu lumo la paroĥestro de Ars observis kreitaĵaron. Li trairis ĝin tra ĉiuj niveloj, por ke li adorkliniĝu antaŭ postsignoj de sia Dio. Li ekkonadis tiun, kiu estas en siaj kreituloj senlime bela. Senrimarke li lasis eĉ ne tion plej malgrandan. Same kiel Adamo, kiu pacigita certagrade kun ĉiuj aĵoj estis reveninta al origina senkulpeco kaj al unuatempa edena stato, ankaŭ li rigardis la kreitulojn en Dia helo amante ilin per frateca amo. Lia koro ne nur superfluis per la amo al homoj, sed ankaŭ al ĉiuj videblaj kaj nevideblaj estuloj. El lia buŝo aŭdiĝis vortoj de tenera inklino al la tuta kreitaro, kiun li perceptis en sia nobl-animeco kaj pureco. En kreitaro li vidis sian fraton, kiu esprimas la samajn ideojn kaj elradias la saman amon. Tie, kie okuloj vidis nur paseman belon, li malkovradis per pli profunda rigardo sanktan harmonion kaj eternajn rilatojn, kiuj kunigas la ordon korpan kun la ordo morala, la sekreton de la naturo kaj la misteron de la kredo. Same li agis ĉe rigardo al historio. La jarcentoj kaj homaj eventoj estis por li nur simboloj kaj alegorioj, profetaĵoj kaj plenumo de ĉi tiuj profetaĵoj. Li perceptis voĉojn, kiuj demandas kaj respondas, kaj personojn, kiuj tipe ripetigas. Tre forte kaj kortuŝe efikas rakonto de Vianney ĉerpita el legendo pri la sankta Aleksio: En la momento, kiam la patrino de la sankta Aleksio ekkonas sian filon en la morta korpo de la almozulo, kiu tridek jarojn loĝis sub ŝtuparo de ŝia palaco, ŝi ekvokas: „Ah,

mia filo, kial mi devis vin ekkoni nur tiel malfrue!“ Ĝis animo forlasos nian korpon, ĝi ekvidos finfine Tiun, Kiun ĝi havis en la Plej Sankta Sakramento, kaj kiam ĝi eksentos la neeldireblan feliĉegon, ĝi ekvokos: „Ah, Jesuo, mia trezoro, mia amo! Kial mi devis vin ekkoni ĝis tiel malfrue!“

Iam la paroĥestro de Ars rezultigis specifajn konkludojn el novaj okazaĵoj, kiuj al li faris fortan impreson. Ekzemple: Ĉar la Sinjoro Jesuo ne montriĝas en Plej Sankta Sakramento en tuta sia gloro, tial vi ĉi tie ne observas adekvatan respekton. Tamen Li estas ĉi tie! Li estas meze de vi. Li estas kvazaŭ bona episkopo, kiu ĉi tie estis antaŭ kelkaj tagoj neekkonita kaj kiu ajn lin ektuŝis dum interpuŝado. Ah, se ni sciis, ke tiu estis episkopo.

Sian junecon li dediĉas al diablo kaj siajn lastajn tagojn al Dio, kiu estas tiel bona, ke Li eĉ kun tio volas kontentiĝi. Antaŭ kelkaj tagoj venis du protestantaj predikantoj. Ili ne kredis je vera ĉeesto de nia Sinjoro en la Plej Sankta Sakramento. Mi diris al ili: „Ĉu vi kredas, ke la panpeceto povas mem de si apartigi kaj sin meti sur langon de iu, kiu proksimiĝas por Lin akcepti?“ „Ne. Tia estas neniu pano.“ Al ĉi tiu respondo mi diris: „Mi konis iun, kiu dubis pri la vera ĉeestado de la Sinjoro Jesuo sub formo de la pano. Sed li sopiris ekkredi, kaj tial li petis la Plej Sanktan Virgulinon, ke ŝi elpetu por li kredon. Komprenu bone. Mi ne diras, ke tio okazis ie al iu, tio okazis al mi mem. En la momento, kiam ĉi tiu dubanta homo alproksimiĝis por akcepti sanktan komunion, deglitis la sankta hostio el mia mano. Tiumomente mi estis sufiĉe malproksima de ĉi tiu homo, sed la hostio mem kuŝiĝis sur lian langon.“

Ni prezentas ĉi tie ion el interesaj predikoj de Vianney, ne kiel tutaĵon, sed por ekzemplo al atentemaj legantoj, kiuj povas esti kuraĝigitaj danke al tiuj ĉi tekstoj.



Nedifektita korpo de la sankta Johano Marie Vianney en Bazilko de Ars, Francio

PREDIKO PRI LA SAVO

Ekzistas multaj kristanoj, kiuj ne scias, kial ili estas sur la mondo. „Kial vi min, mia Dio, sendis en ĉi tiun mondon?“ „Por ke mi igu vin feliĉa.“ „Kaj kial vi volas igi min feliĉa?“ „Ĉar mi vin amas.“ Bona Dio nin kreis kaj sendis en ĉi tiun mondon, ĉar Li amas nin. Li volas, ke ni estu beataj kaj feliĉaj, ĉar Li nin amas. Ke ni povu iĝi feliĉaj, ni devas Dion koni, ami Lin kaj servi al Li. Ah, kiel bela estas la vivo! Kiel estas bele, kiel estas grande koni Dion, ami Lin kaj servi al Li. Ĝuste nur tion ni devas fari ĉi tie surtere. Ĉio, kion ni faras ekster tio, estas perdita tempo. Ni povas labori nur por Dio. Ni devas enmetadi niajn verkojn en liajn manojn. Kiam ni vekigis, ni devas diri: „Por Vi, mia Dio, mi volas hodiaŭ labori. Ĉio, kion vi sur min sendos, mi volas akcepti, ĉar tio devenas de Vi. Mia bona Dio, sen Vi mi nenion kapablas, tial Vi helpadu min!“

Ah, kiel ni en la horo de la morto bedaŭros la tempon, kiun ni dediĉis al senbezonaĵoj kaj ripozo anstataŭ tio, ke ni ĝin eluzu por abnegacio, preĝo kaj por bonfarado, por pripenso de nia mizera stato, por priplorado de niaj malfeliĉaj pekoj. Tiam ni ekvidos, ke ni por ĉielo faris nenion. Ah, infanoj, kiel tio estas malĝoja. Tri kvaronoj de kristanoj laboras pro tio, ke ili zorgu pri sia korpo, kiu baldaŭ putriĝos en la tero. Kaj ĉe tio pri sia kompatinda animo ili ne pensas. Ja ĝi venos en eternan feliĉon aŭ malfeliĉon. Ili estas tute senpripensemaj, estas necese pri ili antaŭtimi.

Nur rigardu, kiel tia homo afliktiĝas, maltrankviliĝas, kiom da bruoj li faras, ĉion li volas direkti, oni ne scias, kion li opinias pri si mem, ŝajnas, kvazaŭ li volus diri al suno: „Foriru de ĉi tie, lasu min, mi prilumos la mondon.“ Post mallonga tempo restos el tiu ĉi fera homo maksimume iom da polvo, kiu fluidiĝos en la rivero. Rigardu, karaj infanoj, ofte mi pensas pri tio, ke ni similas al malgrandaj amasetoj da polvo, kiujn la vento forblovas sur la vojon. Ili eltenas nur mallongan tempon kaj tuj ili denove disiĝas.

Ni havas gefratojn, kiuj mortis. Ah, tiuj estas nuntempe tiaj amasetoj da polvo, pri kiuj mi parolas. Iuj diras, ke estas tro malfacile strebadi pri la savo. Kaj tamen estas nenio pli facila. Estas necese respektadi la Diajn ordonojn, la ordonojn de la eklezio kaj gardi sin kontraŭ sep ĉefaj pekoj. Alivorte estas necese fari bonon kaj eviti malbonon. Krom tio oni de ni volas nenion.

Bonaj kristanoj, kiuj klopodas savi sian animon kaj labori pri sia savo, estas konstante feliĉaj kaj kontentaj. Jam nun ili spertas ĉielan feliĉon kaj ili estos feliĉaj dum la tuta eterneco. Sed malbonaj kristanoj, kiuj endanĝerigas sin per damno, estas vere bedaŭrindaj. Ili grumblas, estas malgajaj, malfeliĉaj kaj tiaj ili restos dum la tuta eterneco. Rigardu, kiel granda diferenco tio estas. Ekzistas ĉi tie bona vivregulo: Faru nur tion, kion vi povas proponi al bona Dio. Sed klaĉaĵojn, kalumniaĵojn, maljustaĵojn, ekflamojn de kolero, blasfemojn, malvirgecon, tentemajn teatraĵojn, dancojn ktp., ni ne povas al Li proponi. Kaj tamen tio ĉi ĉio tiel ofte en la mondo okazadas.

Se estas parolo pri la dancoj, diris pri ili la sankta Francisko el Salezo, ke ili

estas kvazaŭ fungoj, la plej bonaj el ili valoras nenion. Sed patrinaj diras: „Mi estas atentema pri mia filino.“ Kompreneble ili atentemas pri ilia tualetoj, sed ilian koron ili ŝirmi ne povas. Tiuj, kiuj permesas dancon en sia domo, surprenas grandegan respondecon antaŭ Dio. Ili respondecas pri ĉio malbona, kio dum tio okazas: pri malbonaj pensoj, kalumnioj, pri sekvoj de ĵaluzoj, malamo, venĝemo. Ah, ke ili bone konsciiĝu ŝarĝon de tiu respondeco. Certe ili neniam plu la dancon permesus. Simile okazas kun tiuj, kiuj faras malbonajn verkaĵojn, malbonajn pentraĵojn, malbonajn skulptaĵojn, tiuj respondecas pri ĉiu malbono, kiun tiuj objektoj kaŭzas dum daŭro de sia ekzistado. Ho, kiel tio instigas homon, ke li skuiĝu. Rigardu, karaj infanoj, ni devas prikonsideri, ke ni devas savi animon kaj ke nin atendas eterneco. La mondo, riĉaĵo, voluptoj, honoro - tio pasos. La ĉielo kaj la infero neniam pasos. Memoru do, kion ni devas fari.

Ne ĉiuj sanktuloj komencis bone, sed ĉiuj bone finis. Ni malbone komencis, do ni klopodu bone fini. Poste ni povos enviciĝi inter ilin en la ĉielo.

PREDIKO PRI LA AMO AL DIO

Nia korpo estas fragila ujo. Ĝi estas objekto destinita por morto kaj vermoj. Kaj tamen ni pli multe strebas, ke ni prizorgu ĝin, ol pri tio, ke ni zorgu pri riĉigo de nia animo, kiu estas tiel granda, ke ne eblas imagi ion pli grandan, verdire nenion! Ni ja scias, ke Dio, gvidata per ardo de la amo, nin ne volis krei similajn al bestoj, sed Li kreis nin laŭ sia bildo kaj laŭ sia similo. Ho, kiel granda estas homo. Homo kreita el amo ne povas vivi sen amo. Li amas aŭ Dion, aŭ amas sin mem aŭ mondon.

Karaj infanoj, rigardu: Mankas al ni nur la kredo. Se homo ne havas kredon, li estas blinda. Tiu, kiu ne vidas, ne ekkonas. Tiu, kiu ne ekkonas, ne amas. Tiu, kiu ne amas Dion, amas sin mem aŭ siajn voluptojn. Li alteniĝas per sia koro sur objektoj, kiuj disiĝas kvazaŭ fumo. Li konas nek veron, nek ion bonan. Li povas koni nur mensogon, ĉar li ne havas lumon kaj vivas en nebulo. Se li havas lumon, certe li vidus, ke ĉio tio, kion li amas, al li povas alporti nur la eternan morton. Tio estas antaŭĝuo de infero.

Karaj infanoj, vi vidas, ke krom Dio estas nenio daŭra, nenio, nenio! La vivo neniiĝos! La feliĉo malaperos. La sanstato malboniĝos. Bona nomo estas malpurigita. Ni pelas nin for kiel vento. Ĉio fuĝas galope. Ĉio sin pelas pluen. Ah, mia Dio, mia Dio! Kiel multe estas necese ami tiujn, kiuj per siaj inklinoj sin turnas al ĉiuj ĉi tiuj aferoj. Ili turnas sin al ili, ĉar ili tro amas sin mem. Sed ili ne amas sin per prudenta amo, sed ili amas sin per la amo al si mem kaj al la mondo, kaj tial ili serĉas kreitulojn pli multe ol Dion. Kaj tial ili neniam estas kontentaj. Neniam ili ĝuas trankvilon. konstante ili estas plenaj de maltrankvilo. Konstante ili estas en embarasa kaj angora maltrankvilo, konstante maltrankviligataj.

Rigardu, karaj infanoj, la bona kristano veturas survoje de ĉi tiu mondo per bela triumfa veturilo. La veturilon tiras anĝeloj kaj direktas ĝin nia Sinjoro mem. Kontraŭe al tio la mizera pekulo estas jungita al la veturilo de la vivo, la diablo sidas

sur koĉerbenko pelante ĝin antaŭen per fortaj vipbatadoj.

Karaj infanoj, ago de la kredo, espero kaj amo en si enhavas ĉiun feliĉon de la homo surtere. Per la kredo ni kredas tion, kion Dio promesis al ni. Ni kredas, ke ni foje Lin ekvidos. Ni kredas, ke ni foje Lin spertos kaj ke ĉe Li ni foje restos por-eterne. Kun espero ni atendas plenumon de ĉi tiuj promesoj. Ni esperas, ke ni pro ĉiuj bonfaroj, bonaj ideoj kaj bonaj inklinoj estas rekompencotaj, ĉar Dio nenion neglektas. Kion ni ankoraŭ bezonas por esti feliĉaj?

En la ĉielo ne plu estos kredo eĉ ne la espero, ĉar malaperos nebuloj, kiuj malse- renigas nian menson. Nia spirito ekkonos aferojn, kiuj estas por ĝi ĉi tie surtere kaŝitaj. Ĝi ne plu esperos, ĉar ĉion ĝi havos. Neniu esperas pri ricevo de trezoro, se li ĝin jam posedas. Sed tie estos la amo. Per ĝi ni fakte estos ekzaltitaj. Ni estos ĉirkaŭotaj per oceano da Dia amo kaj la nemezurebla amo de la Koro de Jesuo. La amo do estas ankaŭ antaŭĝuo de la ĉielo. Se ni ekkomprenus ĝin, sentus kaj ĝuus, kiel ni estus feliĉaj. Malfeliĉaj ni estas nur tial, ke ni Dion ne amas.


Ni diras: „Mi kredas, mia Dio, mi firme kredas, sen iu ajn dubo, sen iu ajn difekto.“ Ah, ke ni bone ekkomprenu ĉi tiujn vortojn: „Mi firme kredas, ke Vi estas ĉeestanta, ke Vi min vidas, ke mi estas antaŭ via vido, ke ankaŭ mi foje rigardos vin vid-al-vide, ke mi havos partoprenon je ĉio, kion Vi en la eterneco promesas! Mi esperas, mia Dio, ke vi rekompencos min pro ĉio, kion mi faris, por plaĉi al Vi! Mi amas Vin, mia Dio, mi havas koron por Vin ami!“ Ah, kiel ĉiopotenca estus tiu ĉi esprimo de la kredo, kiu estas ankaŭ esprimo de la amo. Se ni vere ekkonus nian feliĉon en tio, ke ni povas Dion ami, ni estus plenigitaj de mirego. Tio similas, kvazaŭ princo aŭ imperiestro lasus alvoki unu el siaj subuloj dirante: „Mi volas vin igi feliĉa. Restu kun mi kaj eluzadu ĉion, kion mi havas. Sed atentu, ke vi ne faru ion, kio ne plaĉas al mi. Tion evitu, kiel ajn vi povas.“ Kiel zorgeme kaj fervore tiu ĉi subulo strebadus pri tio, en ĉio plaĉi al la princo. Kaj vidu, ĝuste tian proponon disponigas al ni Dio. Kaj ni tiel malmulte zorgas pri lia amikeco, tiel malmulte ni ŝatas liajn promesojn. Ah, kiel nekomprenebla estas tiu ĉi blindeco.

PREDIKO PRI LA PRIORITATO DE LA PURA ANIMO

Nenio estas tiel bela kiel pura animo. Se ni tion ĝuste ekkomprenus, ne estus eble, ke ni la puran animon vanigus. La pura animo estas liberigita de la ligo al materio, de la surteraj aferoj kaj de si mem. Ĝuste tial sanktuloj traktis sian korpon tiel severe, ĝuste tial ili rezignadis al ĝi bezonatajn aferojn, permesadis al ĝi eĉ ne je kvin minutoj malfruigi ellitiĝon, varmigi sin, ion manĝi. Vidu do: Tio, kion perdos la korpo, ricevos la animo, tio, kion perdos animo, ricevos la korpo.

La pureco devenas el ĉielo. Ni devas ĝin peti de Dio. Se ni pri ĝi petas, ni ĝin ricevos. Ni devas fari ĉion, kio estas en nia eblo por ĝin ne perdi. Nian koron ni devas fermi antaŭ fiero, volupto kaj antaŭ ĉiuj pasioj kiel oni fermas pordon kaj fenestrojn, por ke neniu povu enpenetri internen. Kia ĝojo estas por gardanĝelo ŝirmanta tian puran animon.

Karaj infanoj, se la animo estas pura, tiam al ĝi plaĉe rigardas la tuta ĉielo. La puraj animoj ĉirkaŭos nian Sinjoron: Ju pli pura iu estis surtere, des pli proksima li estos ĉe Li en la ĉielo. Se la koro estas pura, ĝi ne povas ekzisti sen la amo, ĉar ĝi trovis fonton de la amo, kiu estas Dio. „Beataj,“ diras la Sinjoro, „estas tiuj, kiuj havas puran koron, ĉar ili vidas Dion.“



Karaj infanoj, ni eĉ ne kapablas ekkompreni tiun povon, kian havas la pura animo antaŭ Dio. Ne ĝi faras volon de Dio, sed Dio faras ĝian volon. Rigardu Moseon, tiun puran animon. Kiam Dio volis puni hebrean nacion, Li al li diris: „Ne petu min, ĉar mia kolero

devas ekflami kontraŭ tiu ĉi popolo.“ Sed Moseo tamen petis kaj Dio la popolon ne punis. Li lasis kompatigi sian koron ne povante rezisti al tiu ĉi pura animo. Ah, karaj infanoj, la animo, kiu neniam estis makulita per malbenita peko, ricevos ĉion, pri kio estas la Sinjoro petata. Por observo de la pureco estas necesaj tri aferoj: la vivo en ĉeesto de Dio, preĝo kaj sakramentoj. Helpi povas eĉ instruaj libroj estantaj vivrimedoj por la animo.

Kiel bela estas la pura animo. Nia Sinjoro permesis al sankta Katarina vidi unu puran animon, kiu ekkonis ĝian belecon dirante: „Sinjoro, se mi ne sciuss, ke estas nur unu Dio, mi pensus, ke ĝi estas Dio.“ La Dia bildo reflektiĝas en pura animo kiel suno en la akvo. La pura animo estas objekto de admiro de tri Diaj personoj. La Patro observas sian verkon: „Tio estas mia kreitaĵo!“ La Filo vidas valoron de sia sango. Li ekkonas belecon, kiu Lin tiom kostis. La Sankta Spirito ĉeestadas en la pura animo kiel en sia templo. La valoron de la animo ni ekkonas ankaŭ el klopodo, kiun faras diablo por ĝin difekti. Infero kuniĝas kontraŭ ĝi, la ĉielo por ĝi. Ah, kiel granda ĝi estas. Por ke ni tre vivece imagu nian majeston, ni devas ofte pensi pri la ĉielo, pri monto Kalvario kaj pri infero. Se ni bone ekkomprenus tion, kion signifas esti infano de Dio, estus neeble, ke ni faru ion malbonan, ni estus surtere kiel anĝeloj. Esti infanoj de Dio! Ah, belega digneco! En tio estas io belega: Havi koron kaj eĉ se ĝi estus kiel ajn malgranda, eluzadi ĝin por ami Dion. Kiel hontinda estas por homo humiligi sin tiel profunde, kiam lin Dio tiel altigis.

Kiam ekribelis anĝeloj kontraŭ Dio, kreis Dio homon kaj tiun ĉi malgrandan mondon. Dio vidis, ke tiuj anĝeloj ne plu povas ĝuadi beatecon, por kiu ili estis kreitaj. Tiun ĉi mondon, kiun ni vidas, donis al ni Dio, por ke ĝiaj fruktoj vivtenadu nian korpon. Sed ankaŭ la animo devas esti nutrata.

Sed ĉar la animon povas vivtenadi nenio kreita, bonvolis al ĝi Dio doni sin mem. Sed kia estas tio granda malfeliĉo! Tiel malmulte ni eluzadas tiun ĉi Dian nutraĵon, por ke ni fortigu nin survoje tra dezerto de tiu ĉi vivo, por ke ni konservu nin por la eterna vivo. Kiel homo, kiu ĉe la plena tablo mortas pro malsato, tiel multaj lasas forpasi kvindek sesdek jarojn sen vivtenadi sian animon.

Ah, ke la kristanoj bone ekkomprenu parolon de nia Sinjoro, kiu al ili diras: „Mi neglektas vian mizeron, tial mi volas de proksime vidi la belan animon, kiun mi por mi kreis. Mi kreis ĝin tiel grandan, ke nur Mi povas ĝin plenigi. Mi faris ĝin tiel puran, ke nur mia Korpo povas ĝin vivtenadi.“

Nia Sinjoro ĉiam honorigadis purajn animojn. Ni rimarku la sanktan Johanon, la amatan disĉiplon, kiu surbruste de la Sinjoro ripozis. La sankta Katarina estis pura, tial ŝi tiel ofte promenadis en la paradizo. Kiam ŝi mortis, la anĝeloj transportis ŝian korpon sur la monton Sinajon, sur kiu Moseo ricevis Dekalagon. Dio montris, ke la pura animo estas por Li tiel kara, ke ĝi meritas, ke ankaŭ ŝia korpo, kiu partoprenis je ĝia pureco, estu entombigita fare de la anĝeloj.

Dio kun amo observas puran animon, donas al ĝi ĉion, pri kio ĝi petas. Kiel Li povus rifuzi animon, kiu estas por Li, pere de Li kaj en Li vivas? Ĝi serĉas Lin kaj Dio sin montras al ĝi. Ĝi Lin vokas kaj Dio alvenas. Ĝi kreas kun Li unuecon, ĝi katenligas lian volon. La pura animo povas eĉ havi povon super bona koro de nia Sinjoro. La pura animo estas ĉe Dio kiel infano ĉe sia patrino. Li dorlotas kun ĝi, ĉirkaŭprenas ĝin, tiel kiel faras la patrino kun sia infano, prenante ĝin kun malfermitaj brakoj.

PREDIKO PRI LA SANKTA SPIRITO

Ah, kiel tio estas bela, karaj infanoj. La Patro estas nia Kreinto, la Filo estas nia Savinto kaj la Sankta Spirito nia Akompananto. La homo de si mem estas nenio. Sed li estas granda kun la Sankta Spirito. La homo estas nur surtera kaj entute besteca, sed nur la Sankta Spirito povas la animon suprenlevi. Kio tion kaŭzis, ke la sanktuloj sin tiel liberigis de la tero? Ĉar ili sin lasis gvidi pere de la Sankta Spirito. Tiuj, kiuj sin lasas gvidi per la Sankta Spirito, havas ĝustajn prijuĝojn. Tial estas tiom da nekleruloj, kiuj multe pli komprenas ol tiuj, kiuj estas multe instruitaj. Se ni estas gvidataj pere de la Sankta Spirito, kiu estas lumo kaj forto, Li nin instruas distingadi veron disde herezoj kaj bonon disde malbono. Kiel lorno, kiu montras objektojn pligrandigitajn, donas al ni la Sankta Spirito kapablon diferencigadi grandigite bonon kaj malbonon. Kun la Sankta Spirito ni ĉion vidas grandan: ni vidas grandecon de la plej malgrandaj agoj por Dio faritajn, sed ankaŭ grandecon de plej malgrandaj eraroj. Kiel ekkonas horloĝisto tra lupeo la plej malgrandajn horloĝajn radetojn, tiel ni ekkonas en la lumo de la Sankta Spirito ĉiujn detalojn de nia mizera vivo. Tiuj plej malgrandaj malperfektaĵoj sin montras grandaj al ni en lia lumo. La plej malgrandaj pekoj kaŭzas naŭzon. Ĝuste tial la Virgulino neniam pekis. La Sankta Spirito al ŝi donis ekkoni la naŭzecon de la malbono. Ŝi terurigis antaŭ la plej malgranda eraro.

Tiuj, kiuj havas la Sanktan Spiriton, ne povas esti orgojlaj. Ili ekkonas bone sian mizeran staton. Fieraj estas tiuj, kiuj ne havas la Sanktan Spiriton. Homoj de la mondo ne havas la Sanktan Spiriton, aŭ Lin havas nur por momento, Li ne restadas ĉe ili, la monda ĥaoso Lin forpelas. La kristano gvidata de la Sankta Spirito volonte

forlasas bonojn de tiu ĉi mondo, klopodante akiri ĉielajn trezorojn, kaj kapablas distingadi ilin. La vido de la mondo ne vidas pli ol la surteran vivon, tiel kiel mia okulo ne vidas pli pluen ol nur tiujn ĉi murojn, se estas fermita la pordo de la preĝejo. Sed la okulo de la kristano vidas ĝis eterneco.

Al homo, kiu sin lasas gvidi pere de la Sankta Spirito, ŝajnas, kvazaŭ ne ekzistus mondo. Sed al la mondo ŝajnas, kvazaŭ ne ekzistus Dio. Dependas do de tio, kiu nin gvidas. Se nin ne gvidas la Sankta Spirito, ni faru kion ajn, enestas en tio nek senco nek gusto. Male se nin gvidas la Sankta Spirito, estas en ĉio, kion ni faras, vera plaĉo, homo pro ĝojo mortus. Tiuj, kiuj sin lasas gvidi de la Sankta Spirito, sentas en si ĉiun feliĉon, dume la malbonaj kristanoj iradas en vepro kaj sur akraj ŝtonoj.

Homo, kiu havas la Sanktan Spiriton, neniam sentas enuon estante en ĉeestado de Dio, el kies koro elradias amo. Sen la Sankta Spirito ni estas kiel ŝtono survoje. Ni prenu en unu manon sorbiĝitan spongon kaj en la duan silikon kaj ambaŭ manojn ni ekpremu. El silicŝtono ni nenion elpremas, sed el la spongo ni elpremas multe da akvo. La spongo estas la animo plenigita per la Sankta Spirito kaj la silico estas la koro malvarma kaj malmola, en kiu la Sankta Spirito ne loĝas. La animo, kiu havas la Sanktan Spiriton, trovas en la preĝo tiel grandan ĝuon, ke al ĝi ŝajnas la tempo por la preĝo tro mallonga. Neniam ĝi forgesas pri la ĉesto de Dio. Ĝia koro estas antaŭ bona Savinto en la Plej Sankta Sakramento kvazaŭ vinberaro en la premilo.

La Sankta Spirito kreas en la koroj de justuloj ideojn kaj generas en iliaj buŝoj vortojn. Tiuj, kiuj havas la Sanktan Spiriton, eligas el si nenion malbonan. Ĉiuj fruktoj de la Sankta Spirito estas bonaj. Sen la Sankta Spirito estas ĉio malvarma. Tial, se ni ekrimarkas, ke nia fervoro malmultiĝas, rapide ni devas fari dektagan diservon al la Sankta Spirito por Lin peti pri la kredo kaj amo. Se iu ĉeestis la spiritajn ekzercojn, estas plenigita de bonaj deziroj. Tiuj bonaj deziroj estas spiro de la Sankta Spirito, kiu trairis nian animon kaj ĉion renovigis tiel, kiel varma vento varmigas glacieron kaj denove alkondukas printempon. Ni ne estas grandaj sanktuloj, sed tamen ni havas momentojn, kiam ni spertas dolĉecon de la preĝo kaj la ĉeeston de Dio: Estas tio vizitoj de la Sankta Spirito. Se ni havas la Sanktan Spiriton, nia koro larĝiĝas kaj sin banas en la amo de Dio. Fiŝo neniam lamentas, ke ĝi havas tro da akvo. Tiel ankaŭ bona kristano neniam lamentas, ke li estas tro longe ĉe la bona Dio. Al iuj ŝajnas esti religio enuiga tial, ĉar mankas al ili la Sankta Spirito.

Se ni povus al la damnitoj diri: „Kial vi estas en la infero?“ Ili respondus: „Ĉar ni kontraŭstaris al la Sankta Spirito.“ Kaj se ni demandus sanktulojn: „Kial vi estas en la ĉielo?“ Ili respondus: „Ĉar ni obeis la Sanktan Spiriton.“ Se ekaperas en nia menso bonaj ideoj, estas tio pruvo de tio, ke nin vizitas la Sankta Spirito. La Sankta Spirito estas forto. La Sankta Spirito tenis la sanktan Simeonon sur kolono. Li fortigis la martiron. Sen la Sankta Spirito la martiroj falus kiel falas folioj el la arboj. Kiam estis bruligitaj ŝtiparoj de la martiroj, malvarmigadis la Sankta Spirito ardon de la fajro per la varmo de la Dia amo.

La bona Dio al ni sendas la Sanktan Spiriton kaj traktas kun ni kiel granda reĝo, kiu ordonas al sia ministro gvidi unu sian subulon dirante al li: „Vi akompanos ĉi

tiun homon ĉie kaj vi alkondukos lin al mi reen sanan.“ Kiel estas bele, karaj infanoj, havi kiel akompananton la Sanktan Spiriton. Ah, Li estas bona gvidisto. Sed tamen estas tiaj homoj, kiuj ne volas Lin obei. La Sankta Spirito estas kiel homo, kiu havas veturilon kun bona ĉevalo kaj invitas nin, ke ni veturu kun li tien aŭ alien. Li bezonas nur nian konsenton. Ah, kiel estas tio facila. Ni bezonas nenion alian, ol diri jes. Ni do konsciĝu: La Sankta Spirito nin volas veturigi en la ĉielon, ni bezonas diri jes kaj lasi nin gvidi.

La Sankta Spirito estas kiel ĝardenisto, kiu kultivas nian animon. La Sankta Spirito estas nia servisto. Estas ĉi tie bona fusilo. Vi ĝin ŝargos. Sed iu devas per ĝi ekpafi. Tiel ankaŭ en ni estas kapablo fari bonon, sed nur pere de la Sankta Spirito, Li do kaŭzas bonfarojn. La Sankta Spirito restadas en animoj de justuloj kiel kolombino en bona nesto. Li varmigas bonajn dezirojn en la pura animo kiel kolombino siajn idetojn.

La Sankta Spirito nin gvidas kiel patrino permane sian dujaran infanon, tiel kiel homo, kiu gvidas blindulon. La sakramentoj, kiujn ordonis nia Sinjoro, sen la Sankta Spirito nenion utilis al nia savo. Eĉ la morto de nia Sinjoro sen Li estus senfrukta. Tial diris nia Sinjoro al siaj apostoloj: „Estas bone por vi, ke mi foriros. Ĉar se mi ne foriros, la Parakleto ne venos al vi.“ (Joh 16,7) La alveno de la Sankta Spirito fruktigis semadon de la graco. Vi semas tritikon en la teron! Bone! Sed estas necesa suno kaj pluvo, por ke ĝi ekĝermu kaj plenkreskigu ĝis spikoj.

Ĉiutage matene ni devus diradi: „Mia Dio, sendu al mi la Sanktan Spiriton, ke Li konigu al mi, kio estas mi kaj kio estas Vi.“ „Ke mi konu Vin kaj ke mi konu min,“ diris la sankta Aŭgusteno.

PREDIKO PRI LA PLEJ SANKTA VIRGULINO

Dio la Patro kun plaĉo observas koron de la Plej Sankta Virgulino Maria kiel majstran verkon de siaj manoj. Ĉiu amas sian verkon, precipe se ĝi bonsukcesis. Dio la Filo observas koron de sia Patrino kiel fonton, el kiu Li ĉerpis sangon, per kiu Li nin savis. La Sankta Spirito observas ŝian koron kiel sian sanktejon.

La profetoj anoncis gloron de la Virgulino Maria jam antaŭ ŝia naskiĝo. Ili komparadis ŝin al suno. La apero de la sankta Virgulino vere povas esti komparata al bela suno dum nebuleca tago. Antaŭ ŝia alveno estis super niaj kapoj Dia kolero. Kiam surtere aperis la sankta Virgulino, estis la kolero de Dio trankviligita. Ŝi ne sciis pri tio, ke ŝi devas fariĝi la Patrino de Dio. Kaj kiam ŝi ankoraŭ estis infano, ŝi diris: „Ah, kiam mi ekvidos tiun belegan kreitaĵon, kiu devas iĝi la Patrino de Dio?“

La sankta Virgulino nin naskis dufoje. Ĉe la enkorpiĝo de Jesuo Kristo kaj ĉe la piedo de la kruco. Do ŝi estas dufoje nia patrino.

La Plej Sankta Virgulino estas ofte komparata al patrino, sed ŝi estas ankoraŭ multe pli bona ol la plej bona patrino. Ĉar ankaŭ la plej bona patrino punadas sian infanon, se ĝi kaŭzis ĉagrenon, aŭ ĝin batas – opiniante, ke ŝi bone agas. Sed la

Plej Sankta Virgulino tiel ne agas. Ŝi estas tiel bona, ke ŝi rilatas kun ni afable kaj neniam nin punas. La koro de tiu ĉi bona Patrino estas plenigita nur per amo kaj kompato. Ŝi havas neniun alian sopiron, ol vidi nin feliĉaj. Nur al ŝi ni bezonas nin turni por estis elaŭditaj.

La Filo havas sian justecon, la Patrino nur sian amon. Dio nin tiel amis, ke Li pro ni mortis. Sed en la koro de nia Sinjoro estas justeco, kiu estas Dia eco, dum en la koro de la Plej Sankta Virgulino estas nur mizerikordo. Ŝia Filo la pekulon punus, sed Maria antaŭenpaŝas, retenas punantan glavon elpetante punpardonon por la kompatinda ŝuldanto. „Mia Patrino,“ diras al ŝi la Sinjoro, „mi povas nenion al vi rifuzi.“ Se la infero povus trovi vojon al pento, vi elpetus por ĝi amnestion.

La sankta Virgulino troviĝas meze inter sia Filo kaj ni. Ju pli multe ni pekas, des pli multe ŝi sentas por ni teneran kompaton. La infano, kiu kostis sian patrinon plej multe da larmoj, estas por ŝia koro la plej kara. Ĉu do ne helpas ĉiam la patrino al la plej malforta infano, kiu sin troviĝas en la plej granda danĝero? Ĉu la kuracisto ne dediĉas en malsanulejo la plej grandan flegon al tiuj, kiuj estas plej multe trafitaj de la malsano? La koro de Maria estas rilate al ni tiel bona, ke la koroj de ĉiuj patrinoj entute estas kompare al ŝia koro nur peco da glacio.

Vidu, kiel bona estas la sankta Virgulino! Ŝia granda honoranto la sankta Bernardeno ofte al ŝi diradis: „Mi salutas vin, Maria.“ Iun tagon al li la bonkora Patrino respondis: „Mi salutas vin, mia filo, Bernardo.“ Saluton Maria estas preĝo, kiu neni-am lacigas. Se ni parolas pri la mondaj aferoj, ekzemple pri politiko, ni estas baldaŭ lacigitaj, sed se ni parolas pri la sankta Virgulino, tio do estas konstante nova.

La pieco al la sankta Virgulino estas agraba, vivodona, sukplena, la grandaj gesanktuloj havas ardan rilaton al la sankta Virgulino. Ĉiu graco, kiun ni ricevas elĉiele, iras al ni pere de ŝiaj manoj.

Neniu envenas domon, antaŭ ol li parolas kun pordisto. Jes, la sankta Virgulino do estas la pordistino de la ĉielo. Se ni volas al iu persono ion donaci, ni transdonas tion al ĝi pere de iu, kiun ĝi estimas, por ke nia estimo estu des pli kara. Tial havas niaj preĝoj, se ili estas prezentataj pere de la sankta Virgulino, tute specifan forton, ĉar la sankta Virgulino estas unusola kreitulo, kiu neniam Dion ofendis. Nur la sankta Virgulino plenumis la unuan ordonon: Nur al via Dio vi adorkliniĝu kaj Lin tutkore amu! Ŝi ĝin plenumis plendimensie. Ĉio, pri kio Filo petas la Patron, estas donita. Ĉio, pri kio la Patrino petas la Filon, estas ankaŭ donita.

Se ni per niaj manplatoj tuŝis aromajn objektojn, tiam transdonas niaj manoj la aromon al ĉio, kion ili tuŝos. Ni do lasu niajn preĝojn trairi tra la manoj de la sankta Virgulino, tiam ili agrable bonodoros.

Dum mondfiniĝo la sankta Virgulino travivados absolutan trankvilon. Sed ĝis kiam la mondo daŭras, ŝi estas de ĉiuj flankoj maltrankviligata. Senĉese ŝi estas okupata irante kaj helpante de unu al la alia.

PREDIKO PRI FESTADO DE DIMANĈO

Vi laboras nelaciĝante, karaj infanoj. Sed tio, kion vi perlaboras, ne ĉiam utilas al via animo kaj al via korpo – nome tio, kion vi akiras per via dimanĉa laboro. Se ni demandus tiujn, kiuj laboras dimanĉe, kion ili faris, tre ofte ili povus respondi: „Mi vendis mian animon al diablo, mi krucumis nian Sinjoron kaj neigis mian bapton.“ Tia mizerulo estas do destinita por infero. La tutan eternecon li devos traplorigi, sen ion per tio akiri. Kiam mi vidas iun dimanĉe veturigi ian kargon, ĉiam mi pensas: Ah, tiu ĉi veturigas sian animon en la inferon.

Ho, kiel tre eraras en siaj kalkuloj tiu, kiu perlaboras dimanĉe. Li opinias, ke li perlaboros pli ol aliaj. Ĉu povas iu financa sumo, kiun li perlaboras, kompensi damaĝon, kiun li mem kaŭzis per tio, ke li malrespektis ordonon de la bona Dio? Ĉu vi opinias, ke ĉio dependas de via laboro? Sed nur rememoru malsanon, akcidenton. Ah, kiom da laboro povas esti vantigita per unu fulmotondro, per unu hajlo, per unu frosto. La bona Dio ĉion direktas, Li povas venĝi, kiam kaj kiel Li volas. Li ĉiam havas sufiĉe da rimedoj. Ĉu Li ne estas ĉiam pli forta? Ĉu ne ĉiam ĝuste Li estas la unusola Sinjoro?

Estis unu virino. Ŝi vizitis sian paroĥestron por demandi, ĉu ŝi povas dimanĉe rikolti fojnon. „Sed tio tute ne estas necese,“ diris la paroĥestro, „pri via fojno vi tute ne devas zorgi.“ Sed la virino insistis dirante: „Ĉu vi volas, ke mi lasu mian rikolton por neniigo?“ Tiuvespere ŝi mortis. Ŝi mem estis en pli granda danĝero ol ŝia rikolto.

Ne laboru por nutraĵo, kiu pereas, sed por nutraĵo restanta por la eterna vivo. Kion vi akiris, se vi laboris dimanĉe? Ja la teron vi forlasos tian, kia ĝi estas. Ĝis vi de ĉi tie foriros, nenion vi kunprenos. Ah, tiu, kiu tro adheris al la tero, tre malfacile de ĉi tie foriras. Nia unua celo estas iri al Dio. Nur tial ni estas ĉi tie surtere. Karaj infanoj, dimanĉe ni devus morti kaj lunde releviĝi. La dimanĉo apartenas al bona Dio, ĝi estas lia tago, la tago de la Sinjoro. Li kreis ĉiujn tagojn de la semajno, Li povis destini por si ilin ĉiujn, sed Li donis al ni ilin ses kaj por si Li retenis nur la sepan. Per kia rajto vi etendas manon al tio, kio al vi ne apartenas? Ĉu vi konsciiĝas, ke la ŝtelita havaĵo neniam alportas benon? Ĝuste ankaŭ la tago, kiun vi ŝtelas de la Sinjoro, al vi ne alportos profiton. Mi konas du tre certajn rimedojn, kiel malriĉiĝi: labori dimanĉe kaj ŝteli.

PREDIKO PRI LA VORTO DE DIO

Karaj infanoj, la Dia Vorto estas io tre grava. La gravaj vortoj de nia Sinjoro al la apostoloj estis: „Iru kaj instru!“ Per tio Li pruvis al ni, ke la instruado estas unualoka.

Karaj infanoj, kiel ni ekkonis nian religion? Per instruado, kiun ni aŭskultadis. Per kio naŭzas por ni la peko? Per kio ni akiras plaĉon en virtoj? Kio enverŝas en nin sopiron pri la ĉielo? La instruado. Kio instruas patron kaj patrinojn pri devoj,

kiuj ili devas plenumi rilate siajn infanojn, kaj la infanojn denove al la devoj, kiujn ili devas plenumi rilate siajn gepatrojn? La instruado.

Karaj infanoj, kial homoj estas tiel blindaj kaj nevidantaj? Ĉar ili ne rilatas al la Vorto de Dio serioze. Estas multaj homoj, kiuj preĝas eĉ ne unu Patro nia kaj Saluton Maria por peti bonan Dion pri la graco, por bone aŭskulti lian Vorton kaj el ĝi ĉerpi utilon.

Miaopinie, karaj infanoj, la homo, kiu ne aŭskultadas la Vorton de Dio ĝustamane, ne estos savita. Li ja ne scias, kiel li devas labori pri sia savo. La homo, kiu estas en la religio bone instruita, ĉiam do havas rimedojn por sia savo. Eĉ se li erarvojiĝos al malbonaj vojoj, tamen li havas esperon, ke li baldaŭ aŭ pli poste revenos al bona Dio, eĉ se tio okazus nur en la momento de la morthoro. Kontraste kun tio la persono, kiu ne estas en la religio instruita, similas la homon tute senfortecan kaj malsanan, kiu jam senkonsciante luktas kontraŭ la morto. Li konas nek grandecon de la peko, nek belecon de sia animo kaj valoron de la vorto. Ĝi estas trenata de peko al peko kiel ĉifonpeco, kiu estas trenata tra la ŝlimo.

Vidu, karaj infanoj, kiel nia Sinjoro tre aprezas la Dian Vorton. Al la virino, kiu ekvokis: „Feliĉaj estas la ventro, kiu naskis vin, kaj la mamoj, kiujn vi suĉis,“ Li respondis: „Sed pli ĝuste, feliĉaj estas tiuj, kiuj aŭdas la Vorton de Dio kaj observas ĝin.“ (Luk 11, 27-28) Nia Sinjoro, kiu estas la vero mem, taksas sian vorton ĝuste tiel kiel sian Korpon. Mi ne scias, ĉu pli malbone agas tiu, kiu estas distriĝema dum la sankta meso, aŭ tiu, kiu estas distriĝema dum la religia instruado. Mi vidas ĉi tie nenian diferencon. Dum la sankta meso li allasas, ke li vanigas meritojn de la morto kaj suferado de la Sinjoro, kaj dum la religia instruado li lasas vanigi lian vorton, kiu estas Li mem. Sankta Aŭgusteno diras, ke tio estas same malbona, kvazaŭ iu post transsubstanciigo prenis kalikon kaj elverŝus ĝin teren.

Karaj infanoj, homoj allasas konscienciproĉon pro tio, kiam ili preterlasas la dimanĉan sanktan meson, ĉar tiel ili grave pekas, se ili ĝin proprakulpe preterlasis. Sed ili ne sentas konscienciproĉojn pro ignorado de la religia instruado. Ili ne konjektas, ke tiel ili povas Dion grave ofendi. Kiam vi dum juĝa tago staros antaŭ Dio, kiu diros al vi: „Prezentu kalkulojn el la religia instruado kaj la kristanaj predikoj, kiujn vi aŭskultis, kaj el tiuj, kiujn vi estis povintaj aŭskulti,“ poste vi opinios tute alie. Karaj infanoj, homoj foriras dum la religia instruado. Ili ridas, estas neatentemaj, ili sin opinias tre saĝaj, ol ili la kristanajn predikojn ĉestu. Ĉu vi opinias, karaj infanoj, ke ili restos nepunitaj? Ah, ne, certe ne. La bona Dio tion foje montros. Imagu nur, kiel estas tio malĝoja. La patroj kaj patrinoj evitas la religian instruadon, kaj tamen ili mem estas devintaj instrui siajn infanojn. Sed kiel ili povas ilin instrui? Ja ili mem ne estas instruitaj. Tio estas la rekta vojo en la inferon. Kiel terura tio estas.

Karaj infanoj, mi observis, ke homoj ne ŝatas pli volonte dormi, ol dum religia instruado. Ili diras: „Ĉu mi kulpas pro tio, se mi ekdormiĝis?“ Nu, se mi ĉi tie prezentus iun muzikan prezentigon, certe neniu pensus pri la dormo. Ĉio moviĝus, ĉio estus maldormanta kaj gajanta. Karaj infanoj, la sacerdoto, kiu estas populara,

estas certe atenteme aŭskultata, sed la sacerdoto, kiu ne estas populara, tiun ili eble eĉ priridas. Kiel grandan maljustaĵon ili per tio faras. Ili ne devus rigardi personon de la sacerdoto, al kiu oni riproĉas kion ajn, malkonfidante. La sacerdoto estas ĉiam ilo, kiun uzas la bona Dio, por disdonadi sian sanktan vorton.

Se vi enverŝas fluidaĵon tra funelo - estu la funelo ora aŭ kupra, se la fluidaĵo estas bona, ĝi ĉiam restos bona.

Iuj diras: „La sacerdotoj parolas tion, kion ili opinias konvena.“ Tute ne, karaj infanoj, la sacerdotoj ne parolas, kion ili volas, ili diras nur tion, kion enhavas la evangelio. La sacerdotoj vivantaj antaŭ ni, diradis ĝuste tion, kion diradas ni. Kaj tiuj, kiuj venos post ni, parolos tute la samon kiel ni. Se ni diradus ion malĝustan, baldaŭ estus malpermesite al ni prediki. Ni diras nur tion, kion instruis al ni nia Sinjoro.

Karaj infanoj, mi prezentos al vi ekzemplon. Tiu ĉi montras, kiel danĝere estas ne kredi tion, kion instruas sacerdotoj.


Du soldatoj estis trairintaj vilaĝon, en kiu okazadis la paroĥaj misioj. Unu el ili proponis al sia kolego partopreni la PREDIKON. Tial ili ĝin ĉeestis. La misiisto predikis pri la infero. „Ĉu vi tion ĉion kredas, kion diris tiu pastro?“ demandis tiu pli bona el la duopo. „Ah, ne,“ respondis tiu dua, „mi tion opinias stultaĵoj, per kiuj ili volas homojn angorigi.“ „Do sciu, mi tion kredas. Kaj por pruvi al vi, ke mi tion kredas, mi forlasas la armean servon kaj eniras monaĥejon.“ „Iru, kien vi volas, mi plu iros mian vojon.“ Li do plu iris la vojon, sed baldaŭ li malsaniĝinte mortis. La dua, kiu estis en la monaĥejo, eksciis pri lia morto kaj li arde petpreĝis, ke Dio al li evidentigu, en kia stato mortis lia amiko: Iun tagon, kiam li denove tie preĝis, aperis antaŭ li la mortinto, kiun li tuj ekkonis. Kaj li demandis lin: „Kie vi estas?“ „En la infero, mi estas damnita.“ Ho, vi malfeliĉulo. Kaj nun vi jam kredas, kion diris la misiisto?“ „Jes, nun mi tion kredas. Sed la misiistoj estas neprecizaj en tio, ke ili priskribas eĉ ne centonon de la suferoj, kiujn ni ĉi tie devas suferi.“

Karaj infanoj, ofte mi pensas, ke la kaŭzo de plejmulte da damnitaj kristanoj estas ilia neglektado de la religia instruado. Tial poste malbone estas de ili komprenata la religio. Imagu ekzemple homon, kiu ĉiutage matene devas foriri en sian laborlokon. En lian kapon venis ideo, ke li faru grandan penton kaj dum duono de la nokto li preĝis. Se li havus bezonatajn religiajn konojn, li dirus al si: „Ne, tion mi ne povas fari, ĉar matene mi ne povus bone plenumi miajn devojn. Mi estus dormema kaj kaŭze de ĉiu bagatelajo malpacienca. Dum la tuta tago mi restos ĉagrenanta, mi povus nenion fari. Mi farus eĉ ne duonon de tio, kion mi farus, se mi dumnokte bone ripozus. Kaj tial mi tion ne povas tiamaniere faradi.“

Imagu la ekzemplon, karaj infanoj, ke iu stalservisto volus fasti. Li ja devas dum la tuta tago fosi kaj kultivi kampon. Se estas tiu ĉi servisto bone instruita pri sia religio, li konsideras tiamaniere: „Se mi tion faros, mi ne povos bone fari laboron, kiun ordonis al mi la mastro.“ Kion li do faros? Li formangos adekvatan mangoporcion kaj elektos alian manieron de abnegacio. Sciu do, kiel tion homo faru: Ĉiam sin teni tiel, ke li povu pli bone la bonan Dion glorigi. Iu scias, ke la certa homo vivas en

mizero. Kaj li prenos ion apartenantan al siaj gepatroj por helpi lin. Certe li pli ĝuste farus, se li petus de la gepatroj panpecon, anstataŭ tio, ke li tion prenos, sen ilin demandi. Se la gepatroj ne volas al li doni tion, kion li petas, li petos Dion, ke Li inspiru iun riĉan, kiu donos al la suferanto almozon anstataŭ li. Homo, kiu estas bone instruita en sia religio, ĉiam havas du direktistojn, kiuj antaŭiras: konsilon kaj obeon.

PREDIKO PRI LA PREĜO



Rigardu, karaj infanoj, la trezoro de kristano ne estas surtere, sed en la ĉielo. Nia menso devas ĉiam direkti tien, kie estas nia trezoro.

Homo havas belan taskon - preĝi kaj ami. Do preĝu kaj amu. En tio estas feliĉo de homo. La preĝo estas nenio alia, ol kuniĝo kun Dio. Tiu, kiu havas puran koron kaj estas kunigita kun Dio, tiu en si sentas balzamon, dolĉecon, kiu plenas je ĝuego, lumo, kiu ĉiam lumigas. En tiu ĉi kuntuŝa kuniĝo estas Dio kaj animo kiel du entute fanditaj vakspecoj. Ne plu eblas ilin dividi. Tiu ĉi kuniĝo de Dio kun sia malgranda estulo estas io belega. Estas tio feliĉo, kiun ni ne kapablas ekkompreni.

Ni meritis, por ke ni ne povu preĝi. Sed Dio al ni tion en sia boneco permesis, ni povas alparoladi Lin. Nia preĝo estas incensaĵo, kiun Li akceptas kun la plej granda ŝato. Vi havas malgrandan koron, karaj infanoj, sed la preĝo pligrandigas ĝin kaj kapabligas ami Dion. La preĝo estas antaŭsento de paradizo. Neniam ĝi nin lasas sen respondo. Ĝi estas mielo, kiu fluas en la animon kaj ĉion ĝi dolĉigas. Dum bona preĝo la doloroj solviĝas kiel neĝo per la suno.

La preĝo lasas la tempon rapide pasi, kaj tion tiel agrable, ke ĝian daŭron ni eĉ ne rimarkas. Kiam foje estis preskaŭ ĉiuj ĉirkaŭantaj pastroj malsanaj, mi devis ilin anstataŭadi, tiel ke mi multe piediradis. Dumire mi ĉiam preĝis al bona Dio kaj mi certigas vin, ke mi sentis tute neniun longan momenton.

Multaj enmerĝiĝas en la preĝon kiel fiŝo en akvon. Ĉar ili estas tute en bona Dio, en iliaj koroj estas nenia obstaklo. Ah, kiel multe amas tiel noblaj koroj. Francisko el Asizo kaj sankta Koletta vidis nian Sinjoron kaj parolis kun Li tiel, kiel ni reciproke kune parolas. Sed kelkfoje ni iras preĝejon kaj ni eĉ ne scias, kial ni tien iras, kiucele ni volas peti. Kaj ja ĉiu bone scias, kiam li al iu iras, kiucele li al li iras. Ĉe multaj ŝajnas, kvazaŭ ili dirus al bona Dio: „Mi volas kun vi paroli nur du vortojn, por ke mi povu de vi baldaŭ foriri.“ Mi ofte pensas pri tio, ke kiam ni adorkliniĝas antaŭ nia Sinjoro, ni atingus ĉion, pri kio ni petas, se ni Lin petus kun multe viva kredo kaj kun multe pura koro. Sed ĝuste male ni estas antaŭ Li sen la kredo, sen la espero, sen la sopiro kaj sen la amo!

En homo ekzistas du voĉoj: la voĉo de anĝelo kaj la voĉo de besto. La voĉo de la

anĝelo estas la preĝo. La voĉo de besto estas la peko. Tiuj, kiuj ne preĝas, enfosas sin en la teron kiel talpo, kiu faras truon, por kaŝi sin en ĝi. Ili estas tute surteraj, tute bestecaj. Kaj ili pensas nur pri dumtempaj aferoj, kiel la avarulo, kiu akceptis la viatikon. Kiam al li estis donita por kiso arĝenta kruco, li ekvokis: „Tiu ĉi kruco certe pezas dek unu uncojn.“

Se en la ĉielo estus ebla unu tago sen adorado, ne plu tio estus ĉielo. Kaj se la kompatindaj damnitoj senkonsidere al siaj turmentoj adorus Dion, ne plu ekzistus infero. Ah, ili poste havus koron por ami Dion, langon por glori Lin - por tio ili ja estis destinitaj. Sed nun ili sin kondamnis por tio, ke ili malbenados Lin dum la tuta eterneco. Se ili povus esperi, ke ili iam por unu minuto povus preĝi, ili atendus tiun ĉi minuton kun tia senpacienco, ke tio mildigus iliajn suferojn.

Patro nia, kiu estas en la ĉielo. Ah, kiel bele estas, karaj infanoj, havi Patron en la ĉielo. Venu via regno. Se mi lasos bonan Dion en mia koro reĝi, Li foje lasos min reĝi en sia gloro. Estu via volo. Nenio estas tiel kara kiel plenumi volon de Dio kaj dume estas nenio tiel perfekta. Por ke ni bone faru tion, kion ni devas fari, ni devas tion fari tiel, kiel volas Dio, en perfekta konkordo kun liaj intencoj. Panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ. Ni havas animon kaj korpon. Ni petas bonan Dion por nia mizera mortema korpo kaj Li donas ĉion, kio estas bezonata por konservo de nia vivo. Sed ni petas ankaŭ por nutraĵo de nia animo, kiu estas nia plej belega parto. La tero estas tro malgranda por doni al la animo tion, kio ĝin kapablas plenumi. Ĝi avidas pri Dio kaj nur Dio ĝin povas satigi. Tial por Dio ne estis tro malfacile, kiam Li restis ĉi tie surtere akceptinte sur sin korpon, por ke ĝi iĝu nutraĵo de niaj animoj. „Mia Korpo,“ diris la Sinjoro, „estas vera manĝo. La pano, kiun mi donos al vi, estas mia Korpo oferita por la savo de la mondo.“ La Pano de la animoj estas en tabernaklo. La tabernaklo estas provizejo de la kristanoj. Ah, kiel bele estas, karaj infanoj, kiam la sacerdoto levas hostion kaj montras ĝin. Nia animo povas diri: „Tio estas mia nutraĵo.“ Ah, karaj infanoj, ni estas tro feliĉaj. Nur en la ĉielo ni tion adekvate ekonos. Ah, kiel malmulte ni tion nune komprenas.

PREDIKO PRI SACERDOTO

Nun ni, karaj infanoj, parolos pri la sakramento de sacerdoteco. Ŝajnas, ke tiu ĉi sakramento nenium el vi rilatas, kaj tamen ĝi rilatas ĉiun. Tiu ĉi sakramento levas homon ĝis al Dio. Kiu estas sacerdoto? Homo, kiu reprezentas Dion, la homo, kiu estas komisiita per tuta Dia povo. „Iru al sacerdoto,“ diras nia Sinjoro. „Kiel min sendis mia Patro, tiel ankaŭ mi sendas vin. Estas donita al mi ĉiu potenco enĉiele kaj ankaŭ surtere. Iru kaj instru ĉiujn naciojn. Tiu, kiu aŭdas vin, min aŭdas. Tiu, kiu malŝatas vin, malŝatas min.“

Kiam la sacerdoto pardonas pekojn, li ne diras: „Dio al vi pardonas pekojn.“ Sed: „Mi donas al vi absolvon.“ Li ne diras: „Tio estas la korpo de nia Sinjoro.“ Sed: „Tio estas mia Korpo.“ Sankta Bernardo diras, ke ĉion ni ricevas pere de Maria. Ni ankaŭ povas diri, ke tute ĉion ni ricevas pere de sacerdoto. Jes, ĉiun benon,

ĉiujn ĉielajn donacojn.

Se ni ne havus sakramenton de la sacerdoto, ni ne havus nian Sinjoron. Kiu Lin metis ĉi tien en la tabernaklon? La sacerdoto. Kiu akceptis vian animon dum eniro en la vivon? La sacerdoto. Kiu nutras ĝin, por ke ĝi povu sian pilgrimon realigi? La sacerdoto. Kiu kapabligos ĝin, ke ĝi povu aperi antaŭ Dio purigita per la sango de Jesuo Kristo? La sacerdoto, ĉiam la sacerdoto. Kiu en ĝi denove vekos pacon? Denove nur la sacerdoto. Ne estas eble ekpensi pri iu Dia bonfaro por samtempe ne rememori la sacerdoton.

Ĉu vi pekconfesas al la sankta Virgulino aŭ al iu anĝelo? Ĉu ili donos al vi absolvon? Ĉu ili donos al vi Korpon kaj Sangon de nia Sinjoro? Ne, tute ne. La sankta Virgulino ne povas kaŭzi transsubstanciigon de sia Dia Filo en la hostio. Eĉ se ĉi tie estus eble 200 anĝeloj, ili ne povus al vi doni absolvon. Sed male, ĉiu sacerdoto, eĉ tiu plej simpla, tion povas: „Iru en paco, Dio pardonis viajn pekojn.“ Ah, kiel grava estas la persono de la sacerdoto.

Sacerdoto sin mem kaj sian mision adekvate ekkomprenas nur en la ĉielo. Se ni tion ekkomprenus jam ĉi tie surtere, ni mortus pro timo antaŭ Dio kaj per lia amo. La ceteraj Diaj bonfaroj ne estus por nia utilo kaj ili ne utilis al ni, se ni ne havus sacerdotojn. Kian utilon donus al vi domo plena da oro, se vi havus neniun, kiu al vi malfermus pordon al la trezoro? La sacerdoto havas ŝlosilon al la ĉielaj trezoroj. Li malfermas pordon, li estas mastrumanto de bona Dio. Administranto de liaj valoraĵoj.

Sen la sacerdoto nenion por ni utilis morto eĉ ne la martirigo de la Sinjoro Jesuo. Ni ekrigardu sovaĝulojn: Kio al ili ĝis nun utilis, ke la Sinjoro Jesuo mortis? Ah, tiel longe ili havos neniun partoprenon en bonfaraĵoj de la elaĉeto, ĝis al ili ne venos sacerdotoj, kiuj al ili lian Sangon antaŭmetos. La sacerdoto ne estas sacerdoto por si mem, li ne donas absolvon al si mem, li ne disdonas sakramentojn al si mem, li ne estas ĉi tie por si mem, li estas ĉi tie por vi.

Post Dio la sacerdoto estas ĉio. Lasu paroĥon dudek jarojn sen la sacerdoto kaj ili tie adoros bestojn. Se mi forirus, vi do dirus al vi: „Kion ni ĉi tie en la preĝejo faros? La sankta meso ĉi tie ne estas celebrata, nia Sinjoro ĉi tie ne estas, tute simile ni povas preĝi hejme.“

Se iu volas neniigi religion, tiu direktas siajn okulojn al sacerdoto. Tion tial, ĉar tie, kie ne estas sacerdoto, ne estas eĉ la ofero de la sankta meso. Kaj tie, kie ne estas la mesofero, tie eĉ ne estas religio. Kiam sonorilo alvokas en la preĝejon, iu vin demandus, kien vi iras, vi dirus al li: „Ni iras tien, kie ni ricevos nutraĵon por la animo.“ Se iu vin demandus, kio estas tiu orumita vazo, vi respondus: „Ĝi estas manĝotenejo por animoj.“ Kaj kiu estas tiu, kiu havas de ĝi ŝlosilon, zorgas pri la bezonuloj, preparas solenan festenon kaj servas ĉe la tablo? „Li estas sacerdoto.“ Kaj tie tiu nutraĵo? „Tio estas la plej valorega Korpo kaj Sango de nia Sinjoro.“ Ah, mia Dio, kiel multe Vi min amis.

Rigardu tiun grandan povon de la sacerdoto. La sacerdoto per sia vorto ŝanĝas panpeceton je Dio! Tiel li faras pli grandan verkon, ol se li kreus mondon. Se iu

dirus: „Sankta Filomena aŭskultas paroĥestron de Ars.“ Kompreneble. Povas lin aŭskulti eĉ ŝi, ĉar lin aŭskultas Dio. Se mi ekkonus sacerdoton kaj anĝelon, unue mi salutus sacerdoton kaj poste anĝelon. Anĝelo estas do amiko de Dio, sed la sacerdote estas lia anstataŭanto. Sankta Tereza kisadis lokon, kiun trairis sacerdote. Kiam vi vidas sacerdoton, vi devas diri: „Li estas tiu, kiu min igis infano de Dio kaj per la sankta bapto malfermis al mi ĉielon. Li estas tiu, kiu min post mia peko purigis, tiu, kiu donas al mia animo nutraĵon.“ Dum rigardo al preĝejo ni povas diri: „Kin en ĝi estas? La korpo de nia Sinjoro. Kial Ĝi estas tie? Ĉar la sacerdote celebris la sanktan meson.“

Kian ĝojon havis apostoloj post resurekto de la Sinjoro Jesuo pro tio, ke ili denove Lin vidis, sian Majstron, kiun ili amegis. La sacerdote povas havi la saman ĝojon, kiam ajn li vidas nian Sinjoron, kiun li tenas per siaj manoj. Ni tre estimas objektojn de la sankta Virgulino kaj la Infano Jesuo, kiuj troviĝas en Loreto. Sed ĉu ne estas pli valoraj fingroj de la sacerdote, kiuj tuŝas la plej honorindan Korpon de Jesuo Kristo, kiu estas donata en la kalikon, en kiu estas la Sango, en ciborion, en kiu estas lia Korpo?

La sacerdoteco estas amo de la Koro de Jesuo. Se vi vidas sacerdoton, pensu pri nia Sinjoro Jesuo Kristo.

PREDIKO PRI LA OFERO DE LA SANKTA MESO

Ĉiuj bonaj agoj entute per sia valoro ne egaligas valoron de la sankta meso, ĉar ili estas homaj agoj, sed la sankta meso estas verko de Dio. Martireco estas nenio kompare al ĝi. Ĝi estas ofero, kiun homo per sia vivo fordonas al Dio. La sankta meso estas la ofero, kiun Dio alportas al homo per siaj Korpo kaj la Sango. Ah, kiel grava persono estas sacerdote! Se li tiun ĉi mision ekkomprenus, li mortus. Dio lin obeas. Li diras du frazojn kaj nia Sinjoro venas laŭ lia signo el ĉielo kaj eniras en malgrandan hostion. Dio fiksas sian rigardon al altaro. „Ĉi tiu estas mia Filo, la amata,“ Li diras, „en kiu mi havas plezuron.“ Dio al ni nenion povas rifuzi pro meritoj, kiuj rezultas el ofero de tiu ĉi Ŝafido. Se ni havus kredon, ni vidus Dion en sacerdote, kiu estas kaŝita kiel lumo malantaŭ vitro, kiel vino miksitita kun akvo.

Se mi tenas dum transsubstanciigo la Plej sanktan Korpon de nia Sinjoro en miaj manoj, ofte mi ekkonsciiĝas, ke mi propradire meritas nur inferon. Mi diras mem por mi: „Ah, se mi almenaŭ povus Lin preni kun mi. La infero estus en lia ĉeesto agrabla. Ne estus por mi tie dum la tuta eterneco suferi, se ni tie estus kune. Sed poste infero ne plu ekzistus, la amflamoj estingus kaj flamojn de justeco.“

Kiel bela tio estas. Post transsubstanciigo estas ĉi tie Dio tiel kiel en la ĉielo. Se homo bone ekkomprenus tiun ĉi misteron, li mortus per la amo. Dio nin indulgas pro nia malforteco.

Unu sacerdote dum transsubstanciigo ekdubis, ĉu liaj kelkaj vortoj povas kaŭzi, ke nia Sinjoro descendis sur altaron. Tiumomente li ekvidis hostion tute ruĝan - sange kolorigitan.

Imagu, ke iuj dirus al ni: „Tiu revivigas mortinton.“ Kiel rapide ni kurus por tion vidi. Sed ĉu ne estas la transsubstanciigo, dum kiu ŝanĝiĝas pano kaj vino je Korpo kaj Sango de Dio, ege pli granda miraklo ol reviviĝo de la mortinto? Ni devus ĉiam nin almenaŭ kvaronhoron preparadi por la sankta meso. Ni devus ĉiam antaŭ bona Dio plej multe humiliĝi, kel Li plej multe humiliĝas por ni en la Eŭkaristio. Ni devus plej severe nin konsciencexameni, ĉar ni devas esti en stato de la graco por ĝuste travivadi la sanktan meson. Se ni ekkonus valoron de la sankta meso aŭ pli bone se ni havus kredon, tiam ni ĝin partoprenus multe pli fervore.

Ĉu vi memoras, karaj infanoj, la okazintaĵon, kiun mi rakontis al vi pri la sacerdoto, kiu preĝis por sia amiko? Dio donis al li ekkoni, ke li estas en la purgatorio. Li opiniis, ke li povas por li fari nenion pli efikan ol oferi por lia animo la sanktan meson. En momento de transsubstanciigo li prenis hostion per siaj fingroj dirante: „Sankta Patro, ni faru interŝanĝon. Vi havas animon de mia amiko, kiu estas en la purgatorio, kaj mi havas korpon de via Filo, kiu estas en miaj manoj. Liberigu do mian amikon kaj mi donos al Vi vian Filon kun ĉiuj liaj meritoj kaj suferoj.“ Kaj fakte, en la momento de hostilevado li vidis animon de sia amiko tute brilantan eniradi en la gloron de la ĉielo.

Se ni volas, karaj infanoj, ricevi ion de la bona Dio, ni ankaŭ tion tiel faru. Ni oferu al Li lian amatan Filon kun ĉiuj meritoj de lia morto kaj suferado. Poste li povos nenion al ni rifuzi.

PREDIKO PRI LA VERA ĈEESTADO

Nia Sinjoro estas ĉi tie kaŝita kaj atendas, ĝis ni vizitos Lin kaj prezentos al Li niajn petojn. Vidu, kiel Li estas bona! Li akceptas nin eĉ kun niaj malfortecoj. En la ĉielo, kie ni festos venkon, ni ekvidos Lin en plena gloro. Ĉar ni ne kuraĝas aperi antaŭ Li, tial Li nun kaŝas sin kaj estas simila al homo, kiu estas arestita, kaj diras al ni: „Malgraŭ tio, ke vi ne vidas min, signifas tio nenion, petu min kaj pri kio ajn vi min petos, mi volas tion al vi doni.“ Li estas ĉi tie en la sakramento de la amo, ĝemas kaj senĉese propetas por pekuloj ĉe sia Patro. Kion ĉion Li surprenas, kiam Li ĉeestadas inter ni. Li estas ĉi tie por nin konsoli, tial ni devas Lin ofte vizitadi. Kiel estas agrabla por Li la kvaronhoreto, kiun ni ŝparas el niaj ofte tiel neutilaj agadoj, por preĝi al Li, Lin viziti kaj ĝojigi Lin por ĉiuj ofendoj, kiujn Li ricevas. Kiam Li vidas, kiel sopireme al Li sin direktas puraj animoj, kun ekridado Li sanigas ilin. Ili venas al Li, per simpla maniero, kiu plaĉas al Li, ili elpetas pardonon por ĉiuj pekuloj. Kian feliĉon ni sentas en la ĉeesto de Dio, se ni antaŭ lia tabernaklo pasigas momentojn en soleco ĉe liaj piedoj! Tiel do, mia animo, estu tre ekflamiĝinta. Vi estas ĉi tie sola por adori vian Dion. Lia rigardo direktas nur al vi sola. Tiu ĉi Savinto estas plena de amo al ni, ke Li elserĉas nin ĉie. Ah, karaj infanoj, se vi nokte vekigaŝ, tuj en la spirito transportu vin antaŭ tabernaklon kaj diru al nia Sinjoro: „Mia Dio, jen mi estas ĉi tie. Mi estas ĉi tie por Vin adori, Vin laŭdi, Vin glori, Vin danki, Vin ami, por ke mi kune kun anĝeloj estu via kunulo!“ Parolu preĝojn, kiujn

vi konas, kaj se vi ne povas preĝi, tiam do rifuĝu al via bona anĝelo kaj konfidu al li, ke li preĝu anstataŭ vi.

Kiam vi eniras preĝejon kaj vi trempas fingrojn en la sankta akvo, kiam vi metas manon sur frunton por krucosigni vin, ekrigardu la tabernaklon: nia Sinjoro Jesuo Kristo per la sama signo tiumente benas vin.



Koro de la sankta Johano Vianney

Ah! Ke ni havu anĝelajn okulojn por vidi nian Sinjoron Jesuon Kriston, kiu estas ĉeestanta ĉi tie sur la altaro kaj rigardas nin! Kiel ni Lin amus! Ni volus neniam Lin forlasi. Ni daŭre restadus ĉe liaj piedoj, tio estus antaŭgusto de ĉielo.

Ĉio cetera por ni iĝus sengusta. Tiel do vi rigardu, la kredo, ah la kredo, ĝi mankas. Kaj ni estas mizeraj blinduloj havantaj nebulon antaŭ okuloj. Nur la kredo povus tiun nebulon disigi. Tial ni petu, karaj infanoj, kiam mi post momento tenos nian Sinjoron per la manoj, petu Lin, ke Li malfermu okulojn de via koro, voku al Li kiel blindulo apud Jeriko: „Sinjoro, faru, ke mi vidu.“ Se vi plenaj de la kredo sincere al Li vokos: „Faru, ke mi vidu,“ poste vi certe atingos tion, kiucele vi petas, ĉar Li volas vian veran feliĉon. Li havas manojn plenajn da gracoj kaj serĉas, al kiu ilin doni. Sed aj! Kiel malmulte da homoj sopiras pri ili! Ho, tiom da indiferenteco! Ah, tiom da maldankemo! Kiel ni estas malfeliĉaj, karaj infanoj, ke tion ĉi ĉion ni ne komprenas. Foje ni tion ekkomprenos, sed tiam estos jam malfrue!

Nia Sinjoro estas ĉi tie kiel ofera ŝafido. Kaj la preĝo estas tre agrabla por Dio, se vi petas la sanktan Virgulinon, ke ŝi oferu al la eterna Patro sian Dian Filon. Tiu ĉi oferado de la Ŝafido por konvertiĝo de la pekuloj estas la plej bona preĝo, kiun oni povas fari. Ĉiuj preĝoj estas farataj nome kaj pere de meritoj de Jesuo Kristo. Memoru tion, karaj infanoj, kiam ajn mi ricevis iun gracon, mi pri ĝi petis ĝuste tiamaniere kaj neniam restis mia preĝo neelaŭdita. Se vi iras al la sankta komunio, vi ĉiam devas ĝin akcepti kun tia intenco, kaj en la momento, kiam vi akceptas la Korpon de nia Sinjoro, diru: „Ah, mia bona Patro, kiu estas en la ĉielo, mi oferas al Vi en tiu ĉi momento vian amatan Filon. Tiel kiel Li estis deprenita el la kruco kaj metita en la brakumon de la Plej Sankta Virgulino kaj kiel ŝi Lin alportis kiel oferon por ni. Mi oferas al Vi lian Plej Sankta Korpon kaj mi petas vin per la buŝo de lia sankta Patrino por pardono de miaj pekoj, ke mi faru bone la sanktan komunio, kaj tiamaniere ke mi ricevu jenajn gracojn: kredon, amon, humilecon.“ Ni ankaŭ devas danki Dion por ĉiuj indulgencoj, kiuj purigas nin de niaj pekoj. Bedaŭrinde tio estas malofte atentata. Sed fine de la vivo ni tion tre bedaŭros.

Kiam ni restadas antaŭ la Eŭkaristio, ni fermu okulojn kaj buŝon anstataŭ iu ĉirkaurigardado, sed ni malfermu nian koron kaj poste ankaŭ bona Dio malfermos sian koron. Ni venos al Li kaj Li venos al ni, Li sin lasos ekkoni de ni. Ĉion, pri kio ni Lin petos, Li donos al ni. Kiel feliĉaj ni sentus nin, se ni tute forgesus pri ni pro

tio, por ke ni amu nur Dion! Sanktuloj havis neniujn intencojn, ol vidi nur Dion, nur por Li labori. Ili forgasadis ĉion kreitan, celante nur Lin trovi. Tia estas ankaŭ la vera vojo, kiel veni en la ĉielon.

PREDIKO PRI LA SANKTA KOMUNIO

Nia Sinjoro diris: „Ĉion, kion vi petos de mia Patro mianome, Li donos al vi.“ Neniam venus en nian menson ideo, ke ni Dion kaj lian propran Filon petu. Sed pri kio neniam homo estus kapabla ekpensi, tion faris Dio. Kion homo ne kapablas eldiri, ja eĉ ne pri tio ekpensi kaj pri kio li neniam kuraĝus peti, tion diris, elpensis kaj faris Dio en sia senlima amo. Ĉu ni iam aŭdacus postuli de Dio, ke Li lasu anstataŭ ni morti sian Filon? Ke Li donu al ni lian Korpon kiel nutraĵon kaj lian Sangon kiel trinkaĵon? Pri tiel granda amo de Dio al homo povis homo havi eĉ ne ideeton.

Sen Dia Eŭkaristio ekzistus sur ĉi tiu mondo neniel ebla feliĉo. La vivo estus rekte neeltenebla. Kiam ni akceptas la sanktan komunio, ni akceptas nian ĝojon kaj nian feliĉegon. Kiam la bona Dio sin volis doni al ni en la sakramento de sia amo, Li enmetis en nin sopiron, kiun kapablas nur Li mem plenumi. Apud ĉi tiu belega sakramento estas ni kiel homo, kiu soifas kaj mortas apud la rivero, kvankam al li sufiĉus nur etendi manon al tiu ĉi trezoro. Tiu, kiu ĝuste akceptas Kriston, perdiĝas en Dio kiel perdiĝas akvoguto en oceano. Ne eblas ilin dividi de si. Kiu el ni, karaj infanoj, ne volas poreterne perdiĝi en tiu ĉi abismo de la amo? En juĝtago ni ekvidos la Korpon de nia Sinjoro brilegi pere de glorigitaj korpoj de tiuj, kiuj Lin ĉi tie surtere inde akceptadis. Tio estos tia, kvazaŭ ni vidus, ke brilas la oro en kupro kaj arĝento en plumbo. Kiam ni akceptis la sanktan komunio, ni povas respondi al tiu, kiu nin demandus: „Kion vi nun portas hejmen?“ „Mi portas hejmen ĉielon.“ Unu sanktulo diris: „Ni estas portantoj de Dio.“ Tio estas plena vero, sed ni ne havas sufiĉan krtecon, ni ne komprenas nian dignecon. Kiam ni foriras de la sankta tablo, ni estas same feliĉaj, kiel feliĉaj estus Tri Magoj, se ili povus forporti kun si infanon Jesuon.

Prenu ujon, plenigu ĝin per valora fluidaĵo kaj tre forte ĝin fermu. Tiel vi konservos tiun fluidaĵon, kiel longe vi volos. Same eblas teni eĉ nian Sinjoron post la sankta komunio en pia kaj pura koro. En atentema spirito vi poste de unu sankta komunio ĝis la venonta en vi spertos ardantan fajron, kiu enverŝos en viajn korojn nerezisteblan inklinon al bono kaj la plej profundan malemon rilate malbonon.

Kiam ni havas bonan Dion en nia koro, tiam devas nia tuta koro bruli. La koroj de disĉiploj irantaj en Emaus brulis, kiam ili nur Lin aŭdis paroli.

Kiam ni revenas de la tablo de la Sinjoro, ni ne devus tuj legi, ja kiucele ni bezonas homajn vortojn, eĉ se ili estus la plej piaj. Se al ni parolas Dio mem, ni devus simili al homo, kiu estas tre scivolema kaj subaŭskultas malantaŭ pordo. Ni devus preterlasi eĉ ne unu vorton, kiun Dio diras en nia koro. Kiam vi akceptis la Sinjoron, vi sentas, ke via animo estas purigita, ĉar ĝi eliris el la bano de la Dia amo. Post

bona akcepto de la sankta komunio homo sentas ion neordinaran, tian feliĉon, kiu trafluetas la tutan korpon. Kaj en kio konsistas tia feliĉo? Nia Sinjoro dividas kun ni ĉion, Li plenigas la tutan nian estaĵon per ĝojo kaj ĝuego. Ni ne povas alie, ni devas ekvoki kun la sankta Johano: „Tio estas la Sinjoro.“ Tiuj, kiuj ne sentas almenaŭ ion similan, estas bedaŭrindaj.

PREDIKO PRI OFTA SANKTA KOMUNIO

Ĉiuj kreitaj estuloj, miaj gefratoj, bezonas nutraĵon por povi vivi. Ĝuste tial Dio lasis kreski arbojn kaj plantojn. Ĉiuj kreitoj sin vivtenadas el tiu ĉi tablo, kiu estas bone provizita. Ĉiu por si prenas adekvatan nutraĵon. Sed ankaŭ la animo devas sin vivtenadi. Sed kie estas ĝia nutraĵo? Karaj gefratoj, kiam Dio volis doni nutraĵon al nia animo, por ke ĝi estu forta por persisti dum sia pilgrimado, Li trarigardante ĉion trovis nenion, kio por ĝi estus konvena. Tiam Li turnis sin mem al si decidante doni sin mem. Ah, mia animo! Kiel granda vi estas? Ja nur Dio vin povas satigi. La nutraĵo de la animo estas la Korpo kaj la Sango de Dio. Ah, belega nutraĵo! La animo povas satigi sin nur per Dio, nur Dio al ĝi sufiĉas. Nur Dio ĝin povas pleniĝi. Nur Dio povas kvietigi ĝian malsaton. Mallonge ĝi devas sian Dion havi! Kiel feliĉaj estas puraj animoj, kiuj spertas majestatan destinon unuigadi pere de la sankta komunio kun nia Sinjoro. En ĉielo ili brilas kiel belegaj diamantoj, ĉar Dio videbliĝos en ili. En ĉiu domo estas loko, kie estas deponata provianto por familio, tio estas manĝotenejo. La preĝejo estas domo de la animoj. Tiu ĉi domo apartenas al ni, la kristanoj. Tio signifas, ke ankaŭ en tiu ĉi domo estas manĝotenejo. Ĉu vi tie vidas tabernaklon? Se mi demandu animojn de la kristanoj, kio tio estas, povus ilia respondo esti: „Tio estas nia manĝotenejo.“

Nenio estas tiel granda kiel la Eŭkaristio! Kiam ni metos apud si bonagojn, kiuj estis faritaj en la tuta mondo, apud la sankta komunio, poste ni devas diri, ke tio estas nur polvo kompare al monto. Preĝu, kiam vi havas bonan Dion en via koro. La bona Dio al vi povas nenion rifuzi, se vi al Li alportas lian Filon kaj meritojn de lia sankta morto kaj de lia suferado.

Karaj infanoj, se ni ekkomprenus valoron de la sankta komunio, ni evitus eĉ tiujn plej simplajn erarojn. Ni sopirus nur pri tio, ke ni havu feliĉon esti indaj akceptadi la sanktan komuniojn plej ofte. Ni tenadus nian animon antaŭ rigardo de Dio ĉiam puran. Ni supozu, karaj infanoj, ke vi hodiaŭ estis ĉe la sankta pekconfeso, vi do singardos pri vi kaj vi sin sentos feliĉaj ĉe ekpenso pri tio, ke morgaŭ vi povos en sian koron akcepti bonan Dion. Via animo estos tute saturita per valorega Sango de nia Sinjoro. Ah, kiel belega estas tia vivo.

Ah, karaj infanoj, kiel belega estos la animo en eterneco, se ĝi ofte bone preparita akceptadis amantan Dion! La Korpo de nia Sinjoro tralumos nian korpon, lia plej honorinda Sango tralumos nian sangon. Nia animo dum la tuta eterneco estos kunigita kun la animo de nia Sinjoro. Ĝi ĝuos puran kaj perfektan feliĉegon! Karaj infanoj, kiam eniras kristano la ĉielon, kiu akceptis la Korpon de la Sinjoro, pliiĝos

per tio ĝojo en la ĉielo. Anĝeloj kaj la Reĝino de la Anĝeloj venas renkonten al li, ĉar en lia animo ili rekonas la Filon de Dio. Poste la animo akceptos rekompencan por sufero kaj oferoj, kiujn ĝi dum sia vivo toleris.

Estas ekkoneble, karaj infanoj, kiam la animo neŝarĝita per la grava peko akceptis la Eŭkaristion. Ĝi estas tiel enmerĝita en la amon, trapenetrita kaj transformita, ke ne plu parolas kaj ne agas nur ĝi mem. Ĝi estas humila, kvieta, sensentigita, afabla kaj modesta, ĝi pace vivas kun ĉiuj. Tia animo estas preparita por la plej grandaj oferoj, ĝi estas supertera.

Iru do al la sankta komunio, karaj infanoj, iru al Jesuo plenaj de amo kaj konfido. Iru al Li, por ke vi el Li vivu, ke vi povu por Li vivi. Nur ne diru, ke vi havas tro da laboro. La Dia Elaĉetinto diris: „Venu al mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj, kaj mi vin ripozigos.“ Ĉu vi do povas rifuzadi inviton tiel ameman kaj amikecan? Ne diru, ke vi ne indas tion, sed ke vi tion bezonas. Se la Sinjoro pensus nur pri nia neindeco, tiam Li neniam starigus tiel belegan sakramenton de la amo. Neniu surmonde indas Lin, nek la sanktuloj, nek la anĝeloj, nek la ĉefanĝeloj, ja eĉ ne la sankta Virgulino. Sed Li prefere konsideris niajn bezonojn. Kaj la bezonoj de ĉiu el ni estas tre urĝaj. Ne diru, ke vi estas pekuloj, ke vi estas tro pezigitaj per kulpoj, ke tial vi ne kuraĝas proksimiĝi al la altaro. Prefere tuj diru, ke vi tro malsanas, nevolante uzadi iun kuracilon kaj vi ne volas viziti kuraciston.

Ĉiuj preĝoj dum la meso estas preparo por la sankta komunio. Kaj la tuta vivo de la kristano devas esti preparo por tiu ĉi plej grava ago. Laŭ niaj ebloj ni devas laŭeble plej multe strebi pri tio, por ke ni povu ĉiutage akceptadi la Sinjoron. Kiel multe nin tio devus humiligadi, kiam ni vidas, ke la ceteraj iras al la sankta tablo, dum ni restas stari sur sia loko. Kiel feliĉaj sin sentas la gardanĝelo, kiu kondukas la sanktan animon al la sankta tablo.

Multaj ĉiutage faras spiritan sanktan komunion. Tion ni povas fari dum ĉiu libera momento, ĉar ni devas havi senĉese sopiron akcepti bonan Dion. La sankta komunio kaŭzas al animo tion, kion blovilo al la fajro, kiu estingiĝas, sed en kiu dume estas ankoraŭ sufiĉe da ardantaj karbetoj. Se ni sentas post la sankta komunio, ke malvarmiĝas nia amo al Dio, ni devas rapide fari spiritan sanktan komunion. Se ni ne povas tiutempe viziti preĝejon, ni imagu al ni laŭeble plej vivece, kvazaŭ ni starus antaŭ tabernaklo. Bona Dio havas neniun barilon, kiu Lin apartigus de ni. Ni preĝu kvinfoje Patro nia kaj kvinfoje Saluton Maria, por ke ni preparu nin por la spirita sankta komunio. La bonan Dion ni povas en la sankta sakramento dumtage akcepti nur unufoje. La animo, ardanta pro la amo, tion kompletigas per sopirego akceptadi Lin ĉiumomente.

Ah, homo, kiel granda vi estas! Vi estas nutrata kaj trinkigata per la Korpo kaj la Sango de Dio! Ah, kiel dolĉa estas tiu ĉi vivo, kiu eliras en kuniĝo kun bona Dio! Tio estas ĉielo surtere! Ĉi tie ni ne plu povas paroli pri iuj krucoj, pri iuj suferoj. Tiu, kiu estas tiel feliĉa, ke li akceptis bonan Dion, tiu sentas en sia koro dum longa tempo feliĉegon kaj ĝuegon. La puraj animoj ĉiam havas tiun ĉi senton, kun Dio ili estas kunigitaj, ili estas plenaj de braveco, forto kaj feliĉego.

Karaj infanoj, homoj, kiuj akceptas la sanktan komunian en la horo de la morto, estas tre feliĉaj. Dum la privata juĝo, kiu okazas tuj post la morto, en ili Dio vidas sian Filon kaj ne povas ilin kondamni en la inferon, ah, tion Li vere ne povas. Rigardu do, karaj infanoj, kiel estas super ĉio utile akcepti en lasta momento la sanktajn sakramentojn.

PREDIKO PRI LA PEKO

Peko estas ekzekutisto de Dio kaj murdinto de animo. Ĝi deprenas nin el la ĉielo, por nin enĵeti en la inferon, kaj tamen ni ĝin amas. Ĉu estas eble ekkompreni tiun ĉi frenezecon? Se ni bone ekkomprenus terurajn sekvojn de la peko, ĝi abomeniĝus al ni tiome, ke ne plu estus eble, ke ni iam ĝin faru.

Ah, karaj infanoj, kiel ni estas maldankemaj. Bona Dio volas, ke ni estu feliĉaj. Certe Li volas tiucele helpi nin! Nur tial Li donis al ni sian Leĝon. La Dia Leĝo estas la bona fonto de la ĝojo. La pia reĝo Davido diris, ke la Leĝo estas lia ununura ĝojo kaj ke ĝi estas trezoro, kiu por li havas pli grandan valoron ol la plej granda riĉeco. Plu li diris, ke oni iras laŭ bona vojo, se oni observas la ordonojn de la Eternulo. Bona Dio do volas nin igi feliĉaj, sed ni ne volas esti vere feliĉegaj, ni ne volas feliĉiĝi. Ni deturnas nin de ĝi kaj ni alkliniĝas al diablo. Ni forkuras de nia amiko kaj ni elserĉas nian ĉefan malamikon! Ni pekas, ni mergiĝas en ŝlimon. Se ni foje estas en tiu ĉi ŝlimo, kiel poste malfacile estas eligi el ĝi! Se temus pri nia surtera feliĉo, do ni farus ĉion eblan, por ke ni forigu de ni mizeron kaj suferon. Sed ĉar temas pri la savo de nia animo, tio nin kondukas al mistifika indiferenteco kaj blindeco kaj ni en ĝi restadas. Oni diras, ke multaj pekconfesas, sed malmultaj konvertiĝas. Karaj infanoj, facile oni tion povas klarigi per tio, ke nur tre malmultaj pekconfesas kun larmoj de la sincera pento.

Kiel multajn homojn malhelpas falsa honto por sincere pekconfesi! Ah, kiel ege ni devas tion bedaŭri. Sed la tuta malfeliĉo devenas de tio, ke ni ne pripensas tion kun bezonata seriozeco. Se ni dirus al tiuj, kiuj dimanĉe laboras, se ni dirus al iu juna, kiu du tri horojn dancas, se ni dirus al ebriulo, kiu revenas el drinkejo: „Ĉu vi konsciiĝas, per kio vi nun kulpas? Ah, vi ja nian Sinjoron krucumis.“ Tiumomente ili certe teruriĝas kaj ĝuste per tio ili pruvus, ke ili estas frivolemaj kaj senpripensemaj. Ah, karaj infanoj, ni ne apartenu al tiuj homoj, kiuj ne pripensas tion! Kiel malmulte ni farus malbonon, se ni kun granda seriozeco pensus tion, kion ni faras! Demandu, karaj infanoj, vin mem, kion faris al ni bona Dio, ke ni kapablas Lin ofendadi. Kion do Li faris al ni, ke ni per tiu ĉi vivmaniero Lin denove krucumas, nian Sinjoron, kiu nin tiel ameme eltiris el la infero? Pripensu tion, karaj infanoj. Kiam ajn vi en vi eksentos grandan inklinon por la peko, imagu al vi, ke samtempe vi renkontas nian Sinjoron samvoje, laŭ kiu vi direktas al la peko. Kaj Li al vi dirus: „Ah, retenu! Retenu ja! Ja tie, kien vi volas iri, mi estas denove krucumata.“ Diru vi mem, karaj infanoj, ĉu ne devigus vin tio al pripensado kaj ne ŝirmus vin tio kontraŭ la peko?

La sanktuloj komprenis, kie tre multe estadas Dio per la peko ofendata. Multaj

el ili travivis sian tutan vivon per tio, ke ili priploris siajn pekojn. La sankta Petro ploris dum la tuta sia vivo, li ploris ankoraŭ en la momento de sia morto. La sankta Bernardo kun larmoj en okuloj diris: „Tion mi, mi, mia Sinjoro, mi Vin, Sinjoro alkrucigis.“ Per tio, ke ni pekas, ni malestimas nian bonan Dion. Ni krucumas tiel bonan Dion. Ah, vi animoj, pro kiuj la Sinjoro tiel ege suferis, ah, vi ja ne enĵetu vin mem en la pereon. Memoru pri la amo de nia Sinjoro al vi. Konsciiĝu, kion Li por vi faris! Ah, se la mizeraj damnitaj ricevus ŝancon reveni surteren! Ah, se ili povus okupi nian lokon!

Ho, kiel ni estas naivaj. Bona Dio nin vokas al si kaj ni de Li forkuras. Li volas igi nin feliĉegaj kaj ni priprenas kaj agas kontraŭ lia volo. Li invitas nin, por ke ni Lin amu, kaj ni donas nian koron al diablo. La tempon, kiun Li al ni pruntedonas, por ke ni laboru pri nia savo, ni misuzas por tio, ke ni enĵetu nin en pereon! Ni kontraŭ Li batalas ĝuste per tiuj rimedoj, kiujn Li donis al ni por tio, ke ni al Li fidele servu.

Se ni ĉiam, kiam ni ofendas nian bonan Dion, observus la sanktan krucon, ni aŭdus la Sinjoron, kiel Li en nia animo diras: „Ah, ĉu vere! Ĉu vi volas aliĝi al miaj malamikoj? Ĉu estas eble, ke vi volas min denove krucumi?“ Ah, ekrigardu ja nian Sinjoron surkruce. Observu Lin kun granda perceptemo kaj diru al vi mem: „Jen, kiom kostis mian Savinton por rebonigi tion, kion mi per miaj pekoj al Dio kaŭzis!“ Ah, sensu: Dio descendas sur la teron por iĝi ofero pro niaj pekoj. Dio suferas, Dio mortas. Dio toleras ĉiujn eblajn suferojn, ĉar Li volas sur sin preni ŝarĝon de niaj malvirtoj! Ekkonu ja ĉe rigardo al la kruco nocivon de la peko. Ekkonu, kiel ni devas tre malami la pekon! Ni pripensu kaj rekonu, kion ni devas fari, por ke ni neniam plu estu tiaj, ke ni peku.

En la horo de la morto eble la bona Dio diros: „Diru al mi, kial vi ofendadis min, se mi vin tiom amis?“ Ah, kiu povas ekkompreni la frenezecon de la ofendoj de la bona Dio, kiu estas donacanto de ĉiu bono? Kiu povas ekkompreni, kiam ni plenumas volon de diablo, kiu nur ĉiam embuskas por malutili al ni kaj por nin ĵeti en pereon? Kiu povas ekkompreni tiun ĉi absurdaĵon?

Ĉu vi ne komprenas, karaj infanoj, kia frenezeco estas esti superregataj de la infero per tio, ke vi kuniĝos kun diablo? Kaj tamen ni povus jam en tiu ĉi vivo travivi la ĉielan ĝojon, se ni amus Dion kaj per la amo kuniĝos kun Li. Ŝajnas, ke la bedaŭrindaj pekuloj volas je kia ajn kosto eldevigi verdik-



Baziliko de s-ta J. Vianney en Ars-sur-Fornanc

ton, kiu ilin kondamnos en komunecon de la diablo.

Paradizo, infero kaj purgatorio ekzistas certamaniere jam ĉi tie en tiu ĉi vivo. La purgatorio estas en la animoj, kiuj ne formortis al si mem. La infero estas en la koroj de sendiuloj. La paradizo estas en la koroj de veraj piuloj, kiuj estas kunigitaj kun sia Sinjoro.

PLUA PREDIKO PRI LA PEKO

Tiu, kiu vivas en la peko, agas kiel besto. Besto, kiu ne havas racion, konas nur siajn korpajn postulojn. Homo, kiu iĝas simila al la besto, rezignas pri uzado de sia racio kaj lasas sin regi per sopiroj de sia kadavro, tio estas korpo. Li konas nenion pli bonan ol bone manĝi, bone trinki kaj ĝuadi ĉiujn malplenecojn de la mondo, kiuj estingiĝas kiel vento. Kiel multe estas tiaj mizeruloj bedaŭrindaj, se ili sin pelas post tiu ĉi vento kaptante ĝin. Nenion ili gajnas kaj donas por tio ĉion. Ili oferlasas sian eternecon por la mizerega fumo de la mondo.

Kiel estas malĝoje, karaj infanoj, se la animo estas en la stato de la peko. Ĝi povas en tiu ĉi stato morti kaj ni povas esti certaj, ke ĝi havas nenion merithavan antaŭ Dio. Tial do estas diablo tiel kontenta, se la animo vivas en la stato de la peko kaj restadas en ĝi. Li vidas, ke ĝi laboras por li kaj ke post morto ĝi iĝos lia havaĵo. Kiam la animo estas en la stato de la peko, ĝi estas tute fava, totale putrita, la rigardo al ĝi estas neelteneble naŭza. Ĝi estas pleje bedaŭrinda. Kiam ĝi konsciiĝas, ke bona Dio ĝin rigardas, devus tio kontribui al tio, ke ĝi enpensiĝu pri si. Kian ĝojon havas homo estante en la peko? Nur diru, kian? Ah, tute nenian. Li havas terurajn songojn, kiujn sendas diablo, li falas el abismo en abismon. Ah, faru do ĉion, kio eblas, karaj infanoj, por denove atingi tion, ke vi plaĉu al Dio. Kun granda humilo venu al la pekkonfeso. Jes, faru tion kaj konsciiĝu, ke poste vi dormos trankvile kiel anĝelo. Homo sentas neeldireblan ĝojon, kiam li povas post nokta vekigo preĝi al Dio. Li sur la lipoj havas nur dankesprimojn, li levas sin al la ĉielo tiel facile, kiel aglo ŝvebas en la aero al firmamento.

Rigardu, karaj infanoj, kiel tre naŭzigas la peko homon, kiel terure ĝi lin humili-gas! El anĝelo, kiu estis kreita por ami Dion, ĝi faras diablon, kiu Lin dum la tuta eterneco malbenados. Ah, se nia prapatro Adamo ne pekus kaj se ni mem ĉiutage ne pekadus, ni estus feliĉaj kiel sanktuloj en la ĉielo. Ne plu ekzistus malfeliĉa homo sur la tera surfaco. Ho, kiel bela tio estus.

Jes, vere, karaj infanoj, nur la peko alportas al ni ĉiujn problemojn, plagojn, militon, malsanon, malsaton, tertremon, incendiojn, froston, hajlon, ĝi alportas al ni ĉion, kio nin profunde ĉagrenigas, ĉion, kio nin faras malfeliĉaj.

Rigardu, karaj infanoj, la animo, kiu estas en la stato de la peko, estas konstante malĝoja. Ĝi faru kion ajn, senĉese ĝi estas plena de maltrankvilo nehavante ĝojan momenton. Kontraste al tio la animo, kiu estas kunigita kun la bona Dio, estas ĉiam kontenta, konstante gaja, daŭre plena de ĝojo kaj trankvilo. Ah, kiel bela estas ĝia

vivo kaj kiel bela estos ĝia morto!

Ni timas, karaj infanoj, pro la morto. Tion oni povas klarigi. Jes, pro la peko ni timas antaŭ la morto. Pro la peko estas la morto timiga kaj terura. La peko kaŭzas nian timon antaŭ horo de nia foriro el ĉi tiu mondo. Ah, mia Dio! Ĉu vere ĉi tie ekzistas kaŭzo de la timo? La penso, ke homo estas malbenita fare de Dio, skuiĝas lin. Damnita fare de Dio! Sed kial? Kial homoj sin disponigas al danĝero esti malbenitaj fare de Dio? Pro blasfemado, pro malbonaj pensoj, pro kelkaj minutoj de senmorala volupto! Pro kelkaj minutoj de la senmorala volupto homo porĉiame perdas Dion, sian animon, ĉielon.

Ni ekvidos tiun patron, tiun patriron, tiun fratinon, tiun najbaron kun korpo kaj animo eniri en la ĉielon. Ili ja ĉe ni vivis. Ni kun ili renkontiĝadis, sed ni ignoris sekvi ilian bonan ekzemplon, kaj tial ni descendos kun korpo kaj animo en inferon por tie bruli. Diabloj ĵetos sin sur nin. Ĉiuj diabloj, kies malbonajn inspirojn ni aŭskultadis, nin turmentos.

Se vi vidus, karaj infanoj, ke iu homo preparas grandan brulŝtiparon, sur tiun amason ankoraŭ metas branĉetaĵojn, kaj se vi demandus lin, kion li faras, li respondus: „Mi tion preparas por fajro, kiu bruligados min.“ Kion vi tiumomente ekpensus? Kaj se vi vidus, kiel tiu ĉi homo la brulŝtiparon bruligas kaj sin ĵetas en la brulantan fajron, kion vi dirus? Tiel do tion faras tiu, kiu pekas. Dio nin ne ĵetas en la inferon, sed ni mem nin tien ĵetas per siaj pekoj. La damnito foje diros al si mem: „Mi perdis Dion, mian animon kaj min mem, kaj tion nur proprakulpe.“ Li levos sin el la fajro por denove en ĝin fali. Li konstante sentos bezonon sin levi, ĉar por Dio kiel por la plej alta estulo li estis kreita. Kvazaŭ li estus en la ĉambro, ĉiam li levos sin ĝis plafono, frappuŝos kaj denove falos malsupren. La Dia justeco estas la plafono, kiu la damniton retenas.

Ne estas necese pruvadi ekziston de la infero. Nia Sinjoro mem pri ĝi parolas, kiam Li rakontas okazaĵon pri mizera riĉulo, kiu kriis: „Lazaro, Lazaro.“ Homoj tre bone scias, ke la infero ekzistas, sed ili vivas tiel, kvazaŭ ĝi ne ekzistus. Ili forvendadas sian animon kontraŭ kelkaj arĝentaj moneroj.

Ni prokrastas nian pliboniĝon ĝis la horo de la morto. Sed kiu donos al ni certecon, ke dum tiu terura momento, pro kiuj timis eĉ ĉiuj sanktuloj, ni ankoraŭ havos tempon kaj forton? Ili timis tiun ĉi momenton ĝuste, kiam kuniĝas infero, por nin ataki, ĉar ĝi scias, ke tio estas decidema momento. Multaj perdas fidon kaj maltrankviliĝas per infero ĝis la momento, kiam ili eniras ĝin. La sakramentojn ili ja lasas al si doni, sed de siaj pekoj ili ne lasas sin disigi per la vera pento.

Kiom da ili ofendas Dion tiumomente? Ilia koro estas formikejo de pekoj. Ĝi similas al peco da putra viando mordumita fare de vermoj.

Vere, se la pekuloj pensus pri la eterneco, pri tiu ĉi terura „senfine“, tuj ili konvertiĝus. Konstante, ankoraŭ konstante, dum miloj da jaroj estas la pekinta animo en la infero kaj konstante ĝi suferas same, kiel dum ĝia eniro en ĝin.

PREDIKO PRI LA FIERO

Fiero estas malbenita peko, kiu eligis anĝelojn el Edeno kaj kaŭzis ilian enĵeton en la inferon. Tiu ĉi peko komencis komence de la mondo. Rigardu, karaj infanoj, multoble oni pekas pere de fiero. Iu homo montras sian fieron per siaj vestoj, per sia parolo, per sia staturo, jes eĉ per la irmaniero. Ekzistas homoj, kiuj irante surstrate per sia fierema korptenado kvazaŭ dirus al ĉiuj ĉirkaŭe: „Nur rigardu, kiel granda mi estas, kiel mi estas belkreska, kiel mi tre superas la aliajn.“ La aliaj, se ili faris ion bonan, ne povas ĉesi rakontadi pri tio, kion ili faris. Kaj ĉe ekpenso, ke iu povus pri ili havi malbonan opinionon, ili estas deprimitaj. Aliaj evitas renkonton kun malriĉuloj serĉante socion de riĉuloj. Aliaj fanfaronas estante plenaj de vantemo, se ili havas kontaktojn kun potenculoj de tiu ĉi mondo. Aliaj montras fieron per sia parolo, ili tre zorgas por bele kaj ĝuste sin esprimadi, kaj nenion ili pli timas ol tion, ke ili per ia vorto ne ridindigu sin kaj tiel ili ne estu primokitaj. Kiel tute alie, karaj infanoj, kondutas humiluloj. Eĉ se aliuloj ilin primokas aŭ ilin honoras aŭ ilin laŭdas aŭ mallaŭdas, eĉ se ilin estimas aŭ ilin malŝatas aŭ ilin honorigas aŭ humiliigas, estas tio por ili indiferenta.

Se ni volas ekkoni, karaj infanoj, ĉu iu estas fiero, ni ekaŭskultu, kiel li parolas. La fierulo ĉiam volas havi vorton, antaŭ ĉio li parolas pri si mem. Ĉion li faras pli bone ol la ceteraj. Nur li faras bonon. Li mallaŭdas agojn de la aliuloj opiniante, ke per tio pli elstariĝos liaj propraj agoj.

Karaj infanoj, estas tiaj homoj, kiuj donas grandajn almozojn, por per tio esti admirataj. Sed per tio ili perdas ĉiun ajn meriton! La fieruloj kaj honoremuloj havas nenian profiton el bonaj agoj. Male, iliaj bonaj agoj ŝanĝiĝas je pekoj.

La fiero miksiĝas en ĉion kiel salo. Nin ĝojigas, se oni parolas pri la bono, kiun ni faras, laŭeble plej multe. Se la ceteraj vidas kaj laŭdas niajn virtojn, tio nin ĝojigas. Se ili observas niajn erarojn, tio nin afliktas. Kiel tute alie opiniis kaj opinias sanktuloj! Tute ne kaŭzadis al ili ĝojon, kiam homoj rekonis iliajn virtojn kaj tial ilin laŭdis, kaj siajn malperfektaĵojn la sanktuloj tute ne klopodis kaŝadi.

La fierulo opinias, ke ĉio, kion li faras, li faras bone. Li volas ĉiujn regi, ĉiam li havas veron, sian opinionon li rigardas ĉiam kiel pli bonan ol la opinionon de la aliaj. La humilulo volonte elaŭdas opiniojn de la aliaj kaj neniam li obstinas pri opinioj siaj. Sian opinionon li ĉiam komunikas modesteme kaj li ĝojas pro tio, se la aliaj havas veron. Kaj se la aliaj havas evidentan malveron, tiam li estas plena de indulgemo.

Kiam la sankta Alojzo Gonzaga ankoraŭ kiel lernanto estis mallaŭdita pro io, neniam li strebis pravigi sin. Kun ĉia sincero li diris, kion li pensis. Se li ne pravis, volonte li tion rekonis kaj akceptis. Se li pravis, li ne fanfaronis, sed nur diris: „Ankaŭ mi multfoje ne estis prava.“

La sanktuloj, karaj infanoj, formortis al si mem tiel, ke ili ne multe zorgis, ĉu aliaj ilin opinias pravaj, aŭ ne. Estis por ili tute indiferente, ke en la mondo estis pri ili dirite, ke ili estas malsaĝaj. Eĉ en la mondaj aferoj ili ne volis esti opiniataj

kiel saĝaj, pli multe ili komprenis la aferojn de Dio kaj tion ununuran ili konsideris grava. Pri la mondaj aferoj ili nur malmulte zorgis, ĉar ili konsideris ilin kiel tro vantecaj por al ili dediĉi sian atentemon.

PREDIKO PRI LA MALPURECO

Por ekkoni, kiel malbela kaj abomeninda estas tiu ĉi peko, al kiu nin la diablo tentas ĉe ĉiu okazo, sed ili mem ĝin ne faras, ni bezonas scii kaj denove pripensi, kion tio signifas esti kristano. La kristano estas kreita kiel bildo de Dio, elaĉetita per la sango de Dio. La kristano estas infano de Dio, frato de Dio, heredanto de Dio! La kristano estas objekto de plaĉo de tri Diaj personoj! La korpo de la kristano estas templo de la Sankta Spirito. Ekrigardu do, kio per tiu ĉi peko estas malhonorigata.

Ni estis kreitaj por foje regi en la ĉielo. Sed se ni estas tiel malfeliĉaj, ke ni faras pekon de la malpureco, tiam ni direktas nin al diablo en la inferon. Nia Sinjoro diris, ke nenio malpura eniros lian regnon. Kiel povus la animo, kiu sin makuligis per tiel aĉa maniero, antaŭenpaŝi Dion, kiu estas senfine pura kaj sankta? Ni ĉiuj estas tiaj speguloj, en kiuj Dio sin vidigas. Sed kiel Dio povus ekkoni sin en mia malpura animo?

Ekzistas animoj, kiuj estas tiel mortaj kaj putritaj, ili estas enrigardataj en sian putrecon, kvazaŭ por ili ne plu ekzistus eblo sin levi. Ĉio ilin allogas al malbono. Ĉio memorigas al ili malbonon, kaj ja eĉ tio la plej sankta. Antaŭ okuloj ili havas senĉese ion fian kiel malpura besto, kiu al kutimiĝas al ekskrementaĵoj, en kiuj ĝi trovas sian ĝuon, en ili ĝi sternaĉas sin, en ili ĝi dormas, en la koto ĝi ronkas. Tiaj homoj estas en la okuloj de Dio kaj la sanktuloj aĉaj.

Rigardu, karaj infanoj, nia Sinjoro estis dornokronita por satisfakcii la pekojn de nia fiero. Sed pro tiuj malbenitaj pekoj Li estis skurĝita kaj surkorpe ŝirvundita, kiel Li mem diras, ke ĉiu post lia skurĝado povus kalkuli liajn ostojn.

Ah, karaj infanoj, se ne ekzistus tie kaj ie puraj animoj, kiuj de tempo al tempo al la bona Dio alportas kompenson, kaj per tio ili senarmigas lian justecon, tiam vi devus vidi, kiel ni estus punataj! Ja nuntempe tiu ĉi peko estas tiel kutima en la mondo, ke la homon tio devas timegi. Karaj infanoj, oni povas diri, ke la infero sputas sian abomenindecon sur la teron tiel, kiel fumtuboj el si sputas fumon.

La diablo faras ĉion eblan por makuligi nian animon, kaj nia animo ja estas ĉio. Nia korpo estas nura amaso da putraĵo. Iru al la tombejo kaj vidu tie, kion amas tiu, kiu ŝatas sian korpon.

Kiel mi jam ofte diris, estas nenio tiel abomeninda kiel malpura animo. Estis iufoje sanktulo, kiu petis bonan Dion, ke Li iun malpuran animon al li montru. Li ekvidis tian animon kaj li konsterniĝis. Ĝi do aspektis kiel putranta kadavraĵo, kiu jam tutan semajnon kuŝas eksponita al la suna ardo.

Ni bezonas nur bone observi homon por ekkoni, ĉu li estas vere pura. En rigardo de la pura estas malfermiteco kaj dececo, kiuj tuj malsekretigas, ke la koro volonte

okupiĝas per la bona Dio. Kontraste al tio la rigardo de la malpurulo malsekretigas teruran fajron. Satano eniras liajn okulojn por alkonduki aliajn al la falo kaj ilin allogi al la malbono.

Tiuj, kiuj perdis purecon, similas al pecŝtofo, kiu estas plena da oleaj makuloj. Lavu ĝin, sekigu ĝin, la makuloj ĉiam denove revenas. Tial ofte estas bezonata eĉ miraklo, kiam la malpura animo devas esti denove pura.

PREDIKO PRI LA PEKKONFESO

Karaj infanoj, kiam iu havas sur la animo malgrandan makulon, devas agi kiel homo, kiu havas belan kristalan vazon, pri kiu li zorgas kun granda zorgemo. Kiam li rimarkas, ke sur la vazo kuŝas iom da polvo, li ĝin tuj per spongo purigas. Kiel estas denove la vazo klara kaj brilanta. Tiel devas fari ankaŭ vi, kiam vi rimarkas sur via animo malgrandan makulon. Tuj respektoplene prenu la sanktigitan akvon, faru iun bonagon, kun kiu estas ligita pardono de la malgravaj pekoj, donu almozon, ekĝenuu antaŭ la Plej Sankta Sakramento kaj kun konvena pieco partoprenu la sanktan meson.

Tiu, kiu havas sur sia animo malgrandan makulon, tiu, karaj infanoj, similas homon, kiu suferas pro negrava naŭzeto. Li ne bezonas viziti kuraciston, li mem povas sin sanigi. Se li havas kapdoloron, li bezonas nur kuŝiĝi, se li malsatas, li bezonas manĝi. Sed se li estas danĝere vundita, tiam la malsano estas grava. Tiukaze la kuracisto estas nepre bezonata kaj tiu homo devas direktiĝi per liaj instrukcioj. Ĝuste tiel tion devas ankaŭ fari tiu, kiu faris gravan pekon. Li devas serĉi helpon ĉe kuracisto de la animoj, kiu estas sacerdoto. Li devas uzadi medikamenton, kiun li receptos al li, kaj tio estas pekkonfeso.

Karaj infanoj, ni ne povas ekkompreni Dian bonecon al ni, se ni konsciiĝas, ke Li por ni starigis la sakramenton de la pentofaro. Se ni devus la Sinjoron peti pri iu graco, certe ni neniam eĉ ne ekpensus peti ĝuste pri ĉi tiu graco. Sed Li antaŭsciis nian malfortecon kaj labilecon en bono. Kaj lia amo Lin kondukis al tio, ke Li faris tion, pri kio ni neniam kuraĝus Lin peti.

Se iu al la bedaŭrindaj damnitaj, kiuj estas jam longe en la infero, dirus: „Al la pordego de la infero ni starigos sacerdoton. Ĉiuj, kiuj volas pekkonfesi, nur bezonas veni al li.“ Ĉu vi pensas, karaj infanoj, ke ununura tie restus? La plej grandaj pekujoj ne ĝenus konfesi siajn pekojn. Jes, ili konfesus ilin publike antaŭ la tuta mondo. Ah, kiel malpleniĝus la infero kaj pleniĝus la ĉielo! Nu do ekrigardu, karaj infanoj, ni havas tempon kaj ilojn, kiujn la bedaŭrindaj damnitaj ne havas. Tial certe ĉi tiuj malfeliĉuloj en la infero diras: „Malbenita sacerdoto! Se mi pri vi neniam ion sciuss, mi tiom ne kulpus.“

Ah, kiel estas bele, karaj infanoj, ekpensi, ke ni havas sakramenton, kiu sanigas vundojn de nia animo! Sed ni ankaŭ ĝin devas akceptadi tiel, kiel decas. Alie plimultiĝos al tiuj malnovaj vundoj la novaj. Al la homo, kiu estas plena de vun-

doj, oni konsilas, ke li vizitu hospitalon kaj konfidu sin al kuracisto. La kuracisto sanigos lin. Sed kion vi dirus pri la homo, kiu prenis tranĉilon kaj vundigus sin ankoraŭ pli multe, ol li estis antaŭe? Ah, tamen ni tiel ofte similas al tiu ĉi homo, kiam ni foriras de la konfesejo.

Karaj infanoj, multaj homoj sin malbone pekkonfesas kaj ili eĉ ne multe tion konsciigas. Tiaj homoj diradas: „Mi ne scias, kio okazas kun mi.“ Ili estas plenaj de maltrankvileco kaj angoro nesciante, kial tiel estas. Ili volonte irus al la bona Dio, kaj tamen ili por tio ne havas sufiĉan decidemon. Tio devenas, karaj infanoj, de malnovaj pekoj, post kiuj ĉi tie estas ankoraŭ postsignoj. Ofte tio devenas ankaŭ de la negravaj pekoj, al kiuj homo havas kaŝitan inklinon. Iuj diras ĉion, sed ne havas bezonatan penton, kaj tamen ili akceptas la sanktan komunio. Ah, tiuj mal-sanktigas la Sangon de la Sinjoro. Iu venas al la sankta tablo kun ia malemo dirante: „Mi povas iri, mi jam pekkonfesis ĉiujn pekojn, sed tamen mi ankoraŭ ne havas plene trankvilon en la animo.“ En tiu ĉi necerta stato ili iras al la sankta komunio. Tio estas neinda komunio kaj homo sin konfesas al si mem. La sakramentoj, karaj infanoj, estas blasfemataj ankoraŭ alimaniere. Iu prisilentis gravajn pekojn antaŭ dek aŭ dudek jaroj. Li estas senĉese veaspekta, la peko senĉese revenas antaŭ okulojn de lia animo, li konstante memorigas al si, ke li pekkonfesos, sed tamen li tion denove prokrastas. Kaj tio estas vera infero. Tiaj homoj havas kvazaŭ devigon, ke ili faru la sanktan vivkonfesion, sed tie ili elturniĝas, kvazaŭ ili farus ilin ĝuste nun. Ili ne konfesas, ke tio estas jam dek dudek jarojn nekonfesita peko. Tio estas malbona pekkonfeso. Ili devus ankaŭ diri, ke ekde tiu tempo ili malzorgis siajn spiritajn



religiajn ekzercojn, ke ili ne sentis el servo al Dio tian ĝojon, kiun ili havis antaŭe.

En danĝeron de malhonorigo de la sakramento, karaj infanoj, sin eldonas ankaŭ tiu, kiu en la momento, kiam ekestas ĉirkaŭ la konfesejo brueto, intence rapide pekconfesas, kaj do tiujn pekojn, kiuj al li kaŭzas la plej grandan maltrankvilon. Li trankviligas sin mem dirante: „Mi ja tion konfesis. Se la konfesprenanto ne aŭdis ĉion bone, do tio ne estas mia kulpo.“ Kaj tamen tio estas via kulpo, ĉar vi agis nesincere. Multaj ankaŭ pekconfesas rapide kaj misuzas momenton, kiam la sacerdoto ne estas plene koncentrita.

Imagu, karaj infanoj, domon, en kiu amasiĝis dum longa tempo diversa senordeco. Malgraŭ senĉesa balaado kaj multa purigado, ĉiam ankoraŭ restas naŭza odoro. Ĝuste simile tio estas kun via animo post la pekconfeso. Por tio estas bezonataj multaj larmoj, por ke la animo estu purigita.

Infanoj, pri la pento ni devas arde peti. Post la konfeso ni devas en nian koron enplanti dornon kaj neniam sian pekon malatenti. Ni devas mem fari tion, kion faris anĝelo al la sankta Francisko el Asizo. Li donis al li kvin batojn, kiuj el li neniam malaperis.

PREDIKO PRI LA FUNDAMENTAJ VIRTOJ

Per la saĝo ni ekkonas, kio plej plaĉas al Dio kaj por la savo plej utilas. Ni ĉiam devas elekti tion la plej perfektan. Devas esti faritaj du agoj: unu por persono, kiun ni amas, la dua por tiu, kiu kaŭzis al ni malbonon. Kaj preferi ni devas tiun duan.

Ne estas meritdone fari bonon, se ni ĝin faras nur pro naturaj motivoj. Unu nobelmora sinjorino volis ĉe si havi vidvinon volante al ŝi servi. Sankta Atanaso estis petita, ke li trovi iun tian inter siaj malriĉuloj. Kiam tiu ĉi nobelmora sinjorino renkontis sian episkopon, ŝi al li riproĉis, ke li por ŝi elektis malbone, ĉar onidire tiu ĉi virino estas tro bona kaj tute ne donas al ŝi okazon akiri por si ĉielajn meritojn. Ŝi lin petis, ke li serĉu por ŝi iun alian. La sanktulo elektis tiun plej malbonan, kiun li povis trovi. Ŝi estis malafabla, malĝentila kaj pri nenio ŝi estis kontenta, eĉ se kion ajn por ŝi kiu ajn faris. Ĝuste tiel ni tion devas fari ankaŭ ni. Ne estas do granda merito bonagi rilate al tiu, kiu nin pro tio dankas kaj diversmaniere esprimas sian dankemon.

Ekzistas homoj, kiuj estas neniam tute kontentigeblaj, iliaj pretendoj ne konas limojn. Neniam ili dankas pro tio, kio estis por ili farite. Al ĉiuj ili repagas per maldankemo. Ĝuste al tiaj ni devas fari bonon. En ĉiuj niaj faroj ni devas esti saĝaj. Neniam ni devas agi laŭ nia inklino, sed tiel, kiel tio al bona Dio plej multe plaĉas. Ni supozu, ke iu el vi preparus monsumeton por mescelebro. Sed subite li renkontas malriĉan familion, kiu vivas malriĉe nehavante eĉ por aĉeti panon. Tiu faros multe pli bone, se li la monon preparitan por mescelebro donos al tiuj malfeliĉuloj, ĉar la Plej Sankta Ofero povas esti celebrata kiam ajn. La sacerdoto la sanktan meson

celebros, sed tiuj malriĉuloj povas morti pro malsato. Iu volas senĉese preĝi kaj pasigi tutajn tagojn en la preĝejo. Sed tiu konsciiĝu, ke pli utile estas labori por kelkaj malriĉuloj, kiujn li konas kaj kiuj vivas en granda mizero. Tio estas al bona Dio pli kara, ol se li pasigus la tutan tagon antaŭ la tabernaklo.

La dua fundamenta virto estas modereco. Ni devas reguligi nian imagemon, ne lasi ĝin libere flui, kiel ĝi volus. Ni devas moderigi niajn okulojn, moderigi la buŝon, multaj havas konstante ion dolĉan en la buŝo. Ni devas moderigi niajn orelojn. Ne permesi al ili aŭskulti frivolemajn kantojn kaj senbezonzajn parolojn.

Iuj homoj sin ĉirkaŭas per tiel forta aromo, ke ili estas eĉ ĝeno por tiuj, kiuj estas ĉirkaŭ ili. Ni devas moderigi niajn manojn. Iuj tiudirekte sin kontentigas tiome, ke ili evitas tuŝi ion malglatan. Kaj fine ni devas moderigi la tutan korpon - tiun mizeran ilon. Ni ne devas al ĝi permesi tute liberan ekmovon, tiel kiel kuras ĉevalo sen brido kaj gvidrimenoj, sed ni devas ilin bridi kaj teni per brido. Multaj pensas pri nenio alia ol pri sia korpa bonfarto. Kiel tute aliaj estis la sanktuloj! Ĉu ni iam povos ekstari flanke de ili? Se ni iam atingos savon, ni devos ege longe restadi en purgatorio, nur poste ni povos veni en ilian komunicon. Kontraŭe la sanktuloj tuj ascendis al la ĉielo, kie ili rigardis la bonan Dion.

La sankta Karlo Boromea, tiu granda sanktulo, havis en sia ĉambro belan kardinalan liton, kiun ĉiu povis vidi. Sed apude staris alia. Tiu ne estis videbla. Ĝi konsistis el faskoj de branĉetaĵoj kaj nur sur ĝi li dormadis. Neniam li varmigadis sin. Se iu lin vizitis, li povis rimarki, ke tiu ĉi sanktulo estis ĉiam tiel malproksime de la fajro, ke li ĝin eĉ ne povus senti. Tiaj estis sanktuloj, ili vivis por ĉielo kaj ne por la tero. Ili estis tute ĉielecaj, kaj ni estas tute mondecaj. Ah, kiel bonaj estas tiuj malgrandaj maceradoj, kiujn neniu vidas. Tiel ekzemple se ni kvaronhoron pli frue ellitiĝas aŭ se ni momenton dumnokte preĝas. Sed la plej multaj homoj volas nur tre bone kaj tre longe dormi.

Estis unu ermito kaj tiu konstruis por si „reĝan palacon“ en trunko de kverko. Li metis tien vepron kaj super sian kapon li alligis tri ŝtonojn, por ke li ĉe ĉiu movo eksentu aŭ vepron aŭ ŝtonojn. Ni male volas havi nur molajn litojn, por ke ni povu laŭeble plej komforte ripozadi.

Tre utilaj estas la malgrandaj maceroj: rifuzi varmigon. Se ni malbone sidas, ni ne serĉu pli bonan sidlokon. Se ni promenas en la ĝardeno, ni maceru gustumi fruktojn, kiuj nin plej multe allogas. Ĉe la tablo maceru pri kelkaj glutpecoj, maceru rigardon al belega objekto, kaj tion precipe sur stratoj de grandaj urboj.

Iuj homoj ne kapablas trankvile teni eĉ sian kapon, iliaj okuloj senĉese rigardas al kio ajn. Kiam ni iras surstrate, ni tre vivece imagu al ni, kvazaŭ ni vidus nian Sinjoron, kiel Li antaŭ ni portas sian krucon, kaj la sanktan Virgulinon, kiel ŝi nin rigardas per siaj okuloj, kaj nian gardanĝelon, kiel li iras flanke de ni. Kiel belega estas tia interna vivo. Ĝi akiras al ni kuniĝon kun la bona Dio kaj nin firmigas en Li. Tial ankaŭ, kiam la diablo vidas, ke iu animo strebas pri tiu ĉi interna vivo, li klopdas ĉiuforte ĝin delogi de ĝi. Li plenigas ĝian imagemon per miloj da distremaj

bildoj. Sed la bona kristano tion ignoras. Li iras plu kaj plu al perfekteco kiel la fiŝo sin mergiĝas sur fundon de la maro. Sed ni trenas nin kiel hirudo en la vazo.

Foje vivis du sanktuloj surdezerte, kiuj sin tute ĉirkaŭmetis per vepro, sed ni serĉas nur nian komforton! Sed en la ĉielon ni volas veni, sed samtempe ni volas por ni restigi ĉiun komforton. Ni nenion volas rezigni. Neniu kaze ni volas nin limigadi, kaj tiel ni faras veran malon de tio, kion la sanktuloj faris. Ili klopodis sin diversmaniere maceri, kaj tamen ili meze de tiu ĉi abnegaciado travivadis neeldireblan ĝuon. Kiel feliĉaj estas tiuj, kiuj amas bonan Dion! Ili lasas preterlasi eĉ ne unu eblecon por fari bonon. Kaj avaruloj zorgas nur pri tio, por multobligi sian havaĵon. Dum tiuj feliĉuloj zorgas nur pri tio, por ke ili amasigu laŭeble plej multajn trezorojn por la ĉielo. Kun mirego ni ekvidos dum juĝtago, kiel riĉaj estas tiuj animoj.

PREDIKO PRI LA ESPERO

Karaj infanoj, ni parolos pri la espero. Ĝuste ĝi kreas ĉiun homan feliĉon surtere. Iuj sur ĉi tiu mondo esperas pri tro multe, la aliaj pri tro malmulto. Ili diras: „Nur unufoje mi volas fari ĉi tiun pekon. Kia estas en tio diferenco, se mi ĝin faros trifoje aŭ kvarfoje?“ Same tiel povus diri infano al patro: „Nur ankoraŭ unufoje mi vin batos. Estas egale, se mi vin pardonpetos pro tri aŭ kvar batoj. Kia do estas en tio diferenco?“

Ni rigardu, tiel ili agas kontraŭ la bona Dio dirante: „Nur ankoraŭ tiujare mi petolos kaj mi vizitados dancadon en drinkejo kaj post la jaro mi konvertiĝos. Kiam mi konvertiĝos, la bona Dio min akceptos. Li ne estas tiel malbona, kiel diras sacerdotoj.“ Tute ne, la bona Dio tute ne estas malbona, sed Li estas justa. Ĉu vi eble pensas, ke Li sin direktos konstante nur laŭ via volo? Ĉu vi opinias, ke kiam vi dum la tuta vivo Lin malestimis, ke Li poste volonte vin ĉirkaŭbrakos? Ah, kiel vi tre eraras! Ekzistas certa mezuro de la graco eĉ de peko, post kiu jam Dio cedas kvazaŭ en malantaŭaĵon. Kion vi dirus pri la patro, kiu tute same rilatus ambaŭ infanojn, se unu estas obeema kaj la dua malobeema? Certe vi dirus: „Tiu patro ne estas justama!“ Tiel do, sciuj tion, eĉ Dio ne estus justama, se Li ne farus diferencon inter tiuj, kiuj al Li servas, kaj tiuj, kiuj Lin ofendas.

Karaj infanoj, nune estas tiel malmulte da kredo en la mondo, ke homoj aŭ tro multe esperas, aŭ malesperas. „Mi faris multe da malbono,“ ili diras. „La bona Dio ne povas pardoni al mi.“ Karaj infanoj, tio estas grava blafemo. Per tio estas starigata limo antaŭ Dia mizerikordo, sed la Dia mizerikordo havas neniajn limojn, ĝi ja estas senfina. Eĉ se iu farus tiom da malbono, kiom estus necese por tio, ke la tuta paroĥo estu enpereigita, se li pekkonfesos kun sento de vera bedaŭro pro tio, kion li faris, kaj se li estas sincere kaj firme decidita neniam plu tion fari, la bona Dio pardonos al li.

Estis foje unu sacerdoto, kiu predikis pri la espero kaj mizerikordo de la bona Dio. Al aliaj li transdonadis multajn ideojn kaj multe da fido kaj ilin trankviligadis,

sed li mem malesperis. Post la PREDIKO venis al li juna viro dirante: „Kara patro, mi venas por pekconfesi.“ La sacerdoto diris al li: „Volonte mi aŭskultos vian pekconfeson.“ La junulo konfesis siajn pekojn kaj poste li aldiris: „Kara pastro, mi faris multe da malbono, mi estas perdita!“ „Kion do vi diras, kara amiko? Neniam ni devas malesperi.“ La juna viro ekstaris dirinte: „Kara patro, vi ne volas, ke mi malesperu. Kaj kion vi?“ Tio estis por la sacerdoto radio de lumo. Tute surprizita kaj hontigita li forpelis ideon de malespero, eniris monaĥejon kaj iĝis granda sanktulo. La bona Dio sendis al li anĝelon en persono de junulo por montri al li, ke neniam li devas malesperi. La bona Dio volontes pardonos al ni, se ni de Li pardonon petas. Li por tio estas tiel decidita, kiel patrino estas preparita salti en la fajron por savi infanon.

Jes, karaj infanoj, nur tion firme kredu. Nia Sinjoro estas surtere kvazaŭ patrino, kiu portas sian infanon per brakoj. Tiu infano estas malbona, ĝi piedbatas, mordas, unĝogratas, sed la patrino malatentas tion. Ŝi scias, ke se ŝi ĝin lasus fali, ĝi mem ne kapablus iri. Rigardu, tio estas bildo de nia Sinjoro. Li toleras ĉiujn niajn kapricojn, Li suferas ĉiujn niajn senhontaĵojn, Li pardonas al ni ĉiujn niajn malvirtojn, Li estas tolerema rilate nin eĉ kontraŭ nia volo.

PREDIKO PRI LA SUFERO

Vole aŭ ne vole ni devas suferi. Unu suferas kiel bona krimulo, la alia kiel malbona. Sed ambaŭ suferas. La diferenco estas en tio: Unu kapablas sian suferon fari merithavan, li ĝin akceptas kiel repacigon pro siaj pekoj kaj sin turnas al la krucumita Jesuo. Poste li aŭdas el lia buŝo dolĉajn vortojn de konsolo: „Hodiaŭ vi estos kun mi en la paradizo.“ Sed la dua suferas nur devige, li krias kaj plorkrias, eldiras terurajn malbenadojn kaj blasfemojn kaj mortas en terura malespero.

Ekzistas du manieroj de la sufero. Iu suferas pro amo, la alia sen la amo. La sanktuloj ĉiuj surefis tolereme, ĝoje kaj persisteme, ĉar ili amis. Sed ni suferas kun indigno kaj ekscitiĝo kaj tuj dum la unua momento ni estas langvoraj, ĉar ni ne amas. Se ni amus Dion, tiam ni eĉ amus krucojn. Jes, ja eĉ ni ilin sopirus kaj ĝojus pro ili. Ni rigardus nin feliĉaj, ke ni povas suferi pro la amo al Tiu, kiu pro la amo por ni tiom suferis. Pri kio ni povas plendi? Ah, bedaŭrindaj nekredantoj, kiuj ne havas la feliĉon koni Dion kaj lian senliman bonecon kiel ni. Ili do havas la samajn krucojn kiel ni, sed ili ne havas la saman konsolon.

Vi diros: „Tio estas tro dura, ke homo devas tiel suferi.“ Male, ne estas tio dura, sed agrabla, feliĉiga, dolĉa, estas tio feliĉeco. Nur ni devas ami. Se ni suferas, ni ĉiam devas suferi pro la amo. Rigardu, karaj infanoj, sur la krucvojo ŝajnas esti nur unu paŝo malfacila. La timo antaŭ la kruco estas nia plej granda kruco.

Ni ne havas kuraĝon porti nian krucon. Kiel tio estas stulta! Ni ja iam devos porti nian krucon. Ni faru kion ajn, la kruco nin tenas forte kaj ni ne povas forkuri de ĝi.

Kion ni povas perdi? Kial ni ne amas niajn krucojn tiel, por ke ni ilin elu-

zadu survoje en la ĉielon? Ah, multaj homoj sin dorse turnas al krucoj forkurante antaŭ ili. Sed ju pli ili forkuras, des pli la kruco ilin persekutas, des pli malfacila kaj frakasa ĝi por ili iĝas. Se vi volas esti saĝaj, iru renkonten al ĝi kiel sankta Andreo. Li, kiam ekvidis, ke la kruco por li estas starigita, diris: „Estu salutata, bona kruco! Ah, valora kruco! Ah, postulema kruco! Prenu min en vian brakumon, prenu min for de homoj kaj donu min al mia Sinjoro, kiu min sur vi elaĉetis!“

Aŭskultu bone, karaj infanoj, kion mi diras. Tiu, kiu iras renkonten al la kruco, tiu tuj volonte akceptas vivkrucojn, kiuj alvenas. Eble li kun ili renkontiĝos, li volonte renkontas ilin, li ilin amas, travivas ilin kuraĝe. Ili lin kunigas kun nia Sinjoro, purigas lin, malkatenigas lin de tiu ĉi mondo. Ili malproksimigas el lia koro ĉiujn malhelpaĵojn. Ili lasas lin iri dum tiu ĉi vivo simile kiel ponto ebligas transiri akvon. Rigardu sanktulojn. Se ili ne estis persekutitaj, ili sin mem persekutis. Unu monaĥo plendis al nia Sinjoro, ke homoj lin persekutas. Li diris: „Sinjoro, kion malbonan mi al vi faris, ke ili tiel malbone rilatas min?“ Kaj nia Sinjoro al li respondis tiel: „Kaj kion mi faris, ke ili min kondukis al Kalvario?“ Tiam la monaĥo ekkonis, ploris kaj petis pardonon kaj neniam plu li kuraĝis plendi.

Homoj mondece orientitaj estas sen konsolo havante la krucon. Kaj bonaj kristanoj estas sen konsolo, se ili la krucon ne havas. La kristano vivas meze de krucoj kiel fiŝo en la akvo. Rigardu la sanktan Katarinan havantan du kronojn: la kronon de la pureco kaj la kronon de la martireco. Kiel feliĉega estas la kara sanktulino, ke ŝi pli volonte suferis, ol konsenti kun la peko! Estis iu monaĥo, kiu tiel amis suferon, ke li ligis dikan ŝnuron ĉirkaŭ la korpo. Tiu ĉi ŝnuro al li detiris haŭton kaj baldaŭ ĝi entranĉadis sin ĝis la karno, tiel de tie elrampis vermoj. La monaĥoj postulis, ke li estu el ilia komunumo eligita. Li volonte foriris, ja eĉ ĝoje, kaj sin kaŝis en roka kaverno. Sed tiunokte la prioro aŭdis alparolon de la Sinjoro: „Vi perdis trezoron de via domo.“ Tuj ili serĉis bonan monaĥon volante vidi, de kie aliras la vermoj. La prioro ordonis forigi la ŝnuron. Kiel tio okazis, tuj regeneris la karno kaj la loko estis resanigita.

En unu proksima paroĥo vivis knabo, kiu kuŝis sur sia lito tute premitaĵita. Li estis malsana kaj kompatinda. Mi diris al li: „Kompatinda infano, multe vi suferas!“ Li respondis al mi: „Ne, sinjoro paroĥestro. Mi ne sentas mian hieraŭan doloron kaj morgaŭ mi ne sentos la hodiaŭan.“ „Ĉu vi tamen volus resaniĝi?“ „Ne, mi estadis malbona, ĝis mi ne malsaniĝis, kaj mi povus denove tia fariĝi. Mi estas kontenta, ke estas tiel, kiel estas.“ Rigardu, karaj infanoj, kiel malutilajn ofte havas la bonfarto sekvojn, sed la sufero havas bonajn efikojn! Ni tion ne komprenas, ĉar ni opinias tro sekulareme. Infanoj, en kiuj estas la Sankta Spirito, nin hontigas.

Kiam la bona Dio sendas al ni krucojn, ni defendas nin, lamentas, grumblas. Ni estas tiel grandaj malamikoj de tio, kio kontraŭstaras niajn inklinojn, ke ni volus senĉese esti kiel en dorlotaj brakoj, dum ni devus esti pli eble ĉirkaŭitaj per vepro.

Pere de kruco ni alvenas en ĉielon. Malsanoj, tentoĵoj, suferoj estas plej ofte krucoj, kondukantaj nin en la ĉielon. Tio baldaŭ ĉesos. Ni ekrigardu sanktulojn, kiuj

antaŭiris nin. La bona Dio de ni ne postulas la martirecan morton de la korpo, li volas nur la martirecon de la koro kaj la volo. Nia Sinjoro estas nia modelo, ni prenu nian krucon kaj Lin sekvu! Ni faru kiel soldatoj de Napoleono. Ili devis transiri ponton, al kiu estis pafite. Neniu kuraĝis transiri. Napoleono prenis standardon, iris la unua kaj la ceteraj lin sekvis. Ni ankaŭ tion tiel faru, ni iru post nia Sinjoro, kiu antaŭiris nin.

Iu soldato al mi foje rakontis, ke en unu batalo li duonhoron transiradis la kadavrojn. Estis tie preskaŭ neniu libera loko por meti la piedon sur la teron. La tero estis tute sangigita. Ĝuste tiel ni devas survoje de la vivo transiri la krucojn kaj suferojn, por ke ni povu eniri nian patrujon.

La kruco estas ŝtuparo al la ĉielo. Kiel konsola estas sufero antaŭ la okuloj de Dio kaj vespere dum la konsciencekzameno povante diri al si: „Rigardu, mia animo, hodiaŭ vi havis du tri horojn similajn al Jesuo Kristo! Vi estis kun Li skurĝita, dornokronita, krucumita!“ Ah, kia trezoro tio estas por morto! Kiel bone oni mortas, se homo dum la vivo akceptadis krucojn!

Vi devus strebi havigi al vi krucojn tiel, kiel avarulo strebas havigi al si monon. Nur krucoj disponigos por la juĝa tago pacon, kuraĝon kaj fidon. Kiam venos tiu tago, tiam ni ĝojos pro niaj malfacilaĵoj, ni fieros pro nia humiliĝo, ni riĉiĝos per niaj oferoj.

Se iu al vi dirus: „Mi volas riĉiĝi, kion mi faru?“ Vi respondus al li: „Vi devas labori.“ Nu, por ke ni venu en la ĉielon, ni devas suferi. Nia Sinjoro al ni montras vojon en la persono de Simono de Cireno. Li vokas al siaj amikoj, por ke ili helpu porti lian krucon. La bona Dio volas, ke ni neniam deturnu okulojn de la kruco, tial ni ankaŭ ĝin starigas ĉie, apud vojojn, sur altaĵojn, sur la publikajn placojn, tial ni povas sur ĉiu loko kaj ĉiumomente diri: „Jen, kiel Dio nin amis!“

La kruco ĉirkaŭbrakas la mondon. Ĝi estas starigita ĉie surtere, ĝi estas ĉi tie por ĉiuj. La krucoj estas survoje al la ĉielo kiel bela ŝtona ponto trans rivero, por ke oni povu transiri per ĝi. La kristanoj, kiuj ne suferas, trairas tiun riveron per malfortika ponto, kiu povas ĉiumomente sub iliaj piedoj trarompiĝi.

Tiu, kiu ne amas krucon, tiu eble povas esti savita, sed estas tio ĉiam tre malfacila. Li poste estos nur steleto sur firmamento. Sed tiu, kiu pro sia Dio suferis kaj batalis, brilos kiel bela suno. La krucoj, kiuj transformiĝas je flamoj de la amo, estas kiel fasko da vepro. Ĝin oni ĵetas en fajron kaj la fajro ĝin transformas je cindro. La dornoj estas malmolaj, sed la cindro estas mola.

Ah, kiel feliĉega sin sentas la animo, kiu dum suferado tute apartenas al Dio. Ĝi similas tiel al vinagro, en kiun estis aldonite multe da oleo. La vinagro ĉiam restos vinagro, sed la oleo mildigas ĝian maldolĉon tiel, ke ni ĝin preskaŭ ne plu sentas.

Se oni metas belan vinberaron en premilon, fluos de tie valora suko. Nia animo eldonas sub premilo de la kruco sukon, kiu ĝin vivigas kaj fortigas. Se ni ne havas krucon, ni estas sekegaj. Se ni la krucon portas sinfordone, ni sentas nin eksterordinare fekundaj en ĉiuj virtoj, kio estas komenco de la ĉielo. Bona Dio,



la sankta Virgulino, anĝeloj kaj sanktuloj nin akompanas. Ili estas flanke de ni kaj nin vidas. La transiro de la bona kristano, kiu estis provita per la sufero, en la duan vivon estas kiel transiro de la homo, kiu estas portata sur la lito el rozoj.

La vepro produktas balzamon kaj la kruco elspiras dolĉecon. Sed la vepron ni devas permane dispremi kaj la krucon alpremi al la koro, se ili devas eldoni el si la enhavantan sukcon.

La malfacilaĵoj nin starigas sub la krucon kaj la kruco starigas nin antaŭ la ĉielan pordegon. Por ke ni venu en la ĉielon, ni devas iradi en suferadoj kaj krucoj, ni devas esti neestimataj, malŝatataj, dispremitaj. Surmonde povas esti feliĉaj nur tiuj, kiuj inter la suferoj de la vivo ĝuas pacon de la animo: ili sentas la ĝojon de la Diaj

infanoj. Ĉiuj suferoj estas dolĉaj, se ni ilin travivas kunigite kun nia Sinjoro.

La sufero! Tio ne estas por mi grava. Ĝi ja daŭras nur momenton! Se ni povus unu semajnon pasigi en la ĉielo, ni ekkonus valoron de tiu ĉi momenta sufero. Neniu kruco al ni ŝajnus tro peza, neniu provo ŝajnus al ni tro malfacila. La kruco estas la donaco, per kiu Dio pridonacas siajn amikojn.

Kiel bele estas ĉiumatene alportadi nin kiel oferon al bona Dio kaj ĉion akceptadi por repacigo de niaj pekoj. Ni devas peti por la amo al la krucoj, poste ili por ni iĝos dolĉaj. Mi provis tion kvar kvin jarojn. Mi estis kalumniita, persekutita, puŝata. Ah, mi havis krucojn! Mi ilin havis preskaŭ pli multe, ol mi povis ilin porti. Mi petis kun vera ardo por la amo al la krucoj. Tiam mi sentis min esti feliĉa, ah, kiel feliĉa! Mi diris al mi: „Vere, nur ĉi tie estas feliĉego.“ Neniam ni devas zorgi pri tio, de kie la krucoj venas, ili ja ĉiuj venas de Dio. Ĉiam estas Dio, kiu al ni donas rimedojn, por ke ni povu pruvi nian amon.

* * *

Laŭ la ĉeĥlingva teksto transprenita el www.fatym.com tradukis Miloslav Šváček, kontrollegis Pavol Petřík (decembro 2020)